

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

TURISMO

La nacia  
naturparko

Pieniny

Novaj  
epidemioj

La evoluado  
de la murdistoj

MONATO - serio



Historio de la  
ekonomika pensado



## Prezoj

|                |     | MONATO |      | LA JARO |
|----------------|-----|--------|------|---------|
|                |     | surf.  | aere | aere    |
| Aŭstralio      | AUD | 72     | 81   | 11      |
| Aŭstrio        | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Belgio         | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Britio         | GBP | 29     | 32,6 | 3,6     |
| Danio          | DKK | 298    | 336  | 38      |
| Finnlando      | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Francio        | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Germanio (ok.) | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Germanio (or.) | EUR | 32     | 37   | 5       |
| Hispanio       | EUR | 32     | 37   | 5       |
| Irlando        | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Islando        | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Israelo        | EUR | 32     | 37   | 5       |
| Italio         | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Japanio        | JPY | 5900   | 6760 | 860     |
| Kanado         | CAD | 67     | 76   | 10      |
| Luksemburgo    | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Nederlando     | EUR | 39     | 44   | 5       |
| Norvegio       | NOK | 340    | 384  | 44      |
| Nov-Zelando    | NZD | 82     | 92   | 12      |
| Pollando       | PLN | 70     | 90   | 20      |
| Portugalio     | EUR | 28     | 33   | 5       |
| Sud-Afriko     | EUR | 32     | 37   | 5       |
| Svedio         | SEK | 360    | 407  | 47      |
| Svislando      | CHF | 65     | 74   | 9       |
| Usono          | USD | 47     | 53   | 8       |

**Aliaj landoj:** Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopilo +32 32 33 54 33; retpoŝto: [admin@fel.esperanto.be](mailto:admin@fel.esperanto.be).



- Rimedoĵoj tute senkostaj:**
  - Se vi havas kurantan konton ĉe FEL, kiu estas kredita, simple petu ke ĝi estu debetita.
  - Se vi havas konton ĉe UEA, kiu estas kredita, sendu ĝirilon. La kontokodo de Flandra Esperanto-Ligo ĉe UEA estas fela-x.
  - Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran bankĉekon. En tiu okazo la valuto devas esti la usona dolaro.
- Rimedoĵoj kiuj estas senkostaj en la alvenlando (Belgio) sed eble kostas en la forirlando (via lando):**
  - Petu vian poŝtoŝefojon pri internacia poŝtmandato je nomo de Flandra

## Al kiu pagi?

al via landa peranto

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: [esperfed@ans.com.au](mailto:esperfed@ans.com.au)

**Aŭstrio:** AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: [rudipueh@chello.at](mailto:rudipueh@chello.at) • Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. (pĉk. 7.127.144). R: [apmarks@ping.at](mailto:apmarks@ping.at)

**Belga:** FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: [admin@fel.esperanto.be](mailto:admin@fel.esperanto.be).

**Brazila:** BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília (DF). R: [bel@bmet.com.br](mailto:bel@bmet.com.br).

**Britaj:** EAB, 201 Felixtowe Road, Ipswich IP3 9BJ, Britio (pĉk. 54 891 4007). R: [eab@esperanto.demon.co.uk](mailto:eab@esperanto.demon.co.uk) • Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: [paul@esperanto.freeserve.co.uk](mailto:paul@esperanto.freeserve.co.uk).

**Ĉeĥa:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice R: [vlada\\_hasala@iol.cz](mailto:vlada_hasala@iol.cz).

**Ĉina:** *El popola Ĉinio*, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing. R: [libroservo@china-report.com](mailto:libroservo@china-report.com).

**Dana:** Revuservo de DEA, c/o Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800 Nykøbing F, Danio. Tel.: +45 54 82 95 86/PTel.: +45 40 53 25 06. Rete: [frederikeriksen@post.cybercity.dk](mailto:frederikeriksen@post.cybercity.dk).

**Estona:** Virve Ernits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.

**Filipina:** Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: [fam.fuehrer@t-online.de](mailto:fam.fuehrer@t-online.de)

**Finnaj:** Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647, • *Oy Mendoservo Ak*, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.

**Francaj:** UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: [esperanto-franca@esperanto.org](mailto:esperanto-franca@esperanto.org) • Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

**Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net) • Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: 115471-758 ĉe postbank Karlsruhe; bankkodo 660 100 75). R: [fam.fuehrer@t-online.de](mailto:fam.fuehrer@t-online.de) • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Bonu, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: [RoBo.ESPERO@t-online.de](mailto:RoBo.ESPERO@t-online.de).

**Hispana:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2ª Izda., Santander (IBVA: 0182-3800-33-0203548535).

**Hungara:** Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: [akovacs@cosoft-bt.com](mailto:akovacs@cosoft-bt.com).

**Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

**Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.

**Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

**Japanaj:** KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: [kleg@mvf.biglobe.ne.jp](mailto:kleg@mvf.biglobe.ne.jp) • Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: [jei@mre.biglobe.ne.jp](mailto:jei@mre.biglobe.ne.jp).

**Kataluna:** KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

**Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: [phopkins@uvic.ca](mailto:phopkins@uvic.ca)

**Korea:** Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mupo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: [keast@soback.komet.nm.kr](mailto:keast@soback.komet.nm.kr) • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Koo, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: [esperant@unitel.co.kr](mailto:esperant@unitel.co.kr).

**Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto [miaumiau@sol.racsa.co.cr](mailto:miaumiau@sol.racsa.co.cr).

**Kroataj:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: [mbolesev@public.srce.hr](mailto:mbolesev@public.srce.hr) • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: [orbispictus@iol.it](mailto:orbispictus@iol.it).

**Latva kaj litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Lilio. R: [atrnalim@takas.lt](mailto:atrnalim@takas.lt).

**Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: [wickler.albert@gmx.net](mailto:wickler.albert@gmx.net).

**Nederlanda:** Libro-Servo Esperanto Nederland, Mamixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278). • UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).

**Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: [esperanto@online.no](mailto:esperanto@online.no)

**Nov-Zelanda:** Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wollington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: [Sir\\_Lancelot@compuserve.com](mailto:Sir_Lancelot@compuserve.com)

**Portugala:** PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa. R: [ap.esperanto@clix.pt](mailto:ap.esperanto@clix.pt)

**Pola:** *Skribu al la eldonejo* kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.

**Rusa:** Halina R. Gorecka, p.k. 67, RUS- 620077 Jekaterinburg-77. R: [hrgo@sbank.e-burg.su](mailto:hrgo@sbank.e-burg.su)

**Slovenaj:** Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: [orbispictus@iol.it](mailto:orbispictus@iol.it) • Jovan Mirković, Mima 5, SLO-2000 Maribor. R: [j.mirkovice@siol.net](mailto:j.mirkovice@siol.net)

**Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: [cbeckford@ppc.co.za](mailto:cbeckford@ppc.co.za).

**Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

**Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

**Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org)

**Venezuela:** J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: [jebachrich@hotmail.com](mailto:jebachrich@hotmail.com)



## aŭ rekte al la eldonejo


Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

- Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
- Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, eeŭroj, tratitan je belga banko. Se la bankĉeko ne estas tratita je belga banko, aŭ se ĝi estas en alia valuto ol EUR, aldonu la egalvaloron de 10,5 EUR.
- Petu vian bankon pagi al KBC Antwerpen Belgio, SWIFT-kodo "KREDBEBB", por konto 402-5510531-55.
- Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili estas akireblaj en la plimulto de la poŝtoŝefoj de la mondo. Unu kupono, nur maldekstre stampita de la poŝtoŝefo, aŭ tute ne stampita, valoras 0,79 EUR.

### 3. Rimedoĵoj kiuj kostas en la alvenlando:

- Se vi posedas kreditkarton Eurocard, Visa, Access, Fujicard au Mastercard, eblas pagi citante la numeron kaj la validodaton de la karto. Tiuj kiuj volas uzi PGP-ĉifradon por sendi la donitaĵojn, povas peti la publikan ŝlosilon de FEL per simpla retpoŝto. De pagoj per kreditkarto subtrahiĝos 3 % pro administraj kostoj.
  - Se vi havas poŝtĉekkonton, vi povas pagi al konto n-ro BE66 0000 2653 3843 de Flandra Esperanto-Ligo. Aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj.
- Por limigi la bankkostojn, vi povas pagi pli altan sumon. La tro pagita mono eniros konton vian, pri kiu vi povas disponi por estontaj mendoj.






Estimataj gelegantoj,

**K**e la tiel nomata "nova ekonomio" estas en grava krizo, tion mi ja legas ĉiutage en la gazeto, sed ke mi mem povus fariĝi viktimo de l' perturboj, tion mi ne imagis. La grandaj ŝancoj, kiujn oni vidis en la nova furora komunik-rimedo interreto, miskondukis multajn aventurulojn, kiuj fondis firmaojn kaj promesis al akciuloj enormajn profitojn. Ĉe tio ofte fantazio estis pli granda ol realismo. Tiuj homoj similis al orministoj en iama Nord-Ameriko; kiam ie iu trovis grajneton da oro, tuj alkuregis amaso da aliaj, kiuj volis riĉiĝi. Sed tre ofte profitis nur negocistoj, kiuj vendis ilaron, nutraĵon kaj viskion; la orministoj, trovante preskaŭ neniun valor-metalon, bankrotis. Tiaj fiaskoj kaj bankrotaj nun abundas en la "nova ekonomio". Mi partoprenis la negocon nur kiel kliento de Interret-peranto — sed jen, de hodiaŭ al morgaŭ ĝi — pro nesufiĉa profito — vendis nin klientojn al alia peranto. Sekvo estis, ke mi devis uzi tute alian ret-adreson sen mia persona nomo; la nova estis salato da ciferoj kaj literoj. Matene mi ricevis la leteron (helikpoŝte!), tagmeze jam mi ne povis eniri la reton per la malnova adreso. Poste dum kelkaj tagoj la ret-aliro tute ne funkciis. Klare, ke mi tuj serĉis novan peranton, kiu permesas uzi mian veran nomon por la adreso, kiun ja ĉiuokaze mi devas ŝanĝi ĉie; kaj mi devis komuniki la ŝanĝon al multaj instancoj, konatoj kaj amikoj. Restas la malĝojiga sento, ke oni vendis min kvazaŭ mi estus varo. Ho bela "nova ekonomio"!


Sincere via  
Stefan Maul  
smaul86150@aol.com

|   |    |
|---|----|
| <b>leteroj</b> .....  | 4  |
| <b>el mia vidpunkto</b> .....   | 5  |
| - La mi-demokratio  |    |
| <b>politiko</b> .....   | 6  |
| - LINGVOPOLITIKO: - Lemu la germanan!<br>- lome idiome  |    |
| - NOV-ZELANDO: Daŭras la direkto  |    |
| - BRITIO: Venkas apatio, male demokratio ▶  |    |
| - SLOVENIO: Ĉu bonvena?   |    |
| - NORD-IRLANDO: Bataloj de la floroj  |    |
| - MEZ-EŬROPO: Kiel esti hungaro?  |    |
| <b>ekonomio</b> .....   | 10 |
| - ĈINIO: - La ĉina bilomerkato  |    |
| - INTERNACIA KOMERCO: - Inkotermoj  |    |
| - KONGO: - Telekomunikadaj entreprenoj multiĝas   |    |
| - ĈINIO: - Qinghai-Tibeta fervojo konstruota  |    |
| <b>moderna vivo</b> .....   | 13 |
| - SKIADO: Rompita genuo, rompitaj rekordoj  |    |
| - <i>Opinio: De flegistina vidpunkto ...</i>  |    |
| <b>serio</b> .....  | 14 |
| - Historio de la ekonomika pensado / Parto 5:<br>Trarompo de marĝenismo                           |    |
| <b>lingvo</b> .....   | 16 |
| - RUSIO: La ĉuvaŝa lingvo   |    |
| <b>turismo</b> .....  | 18 |
| - POLLANDO: Pieniny-montaro ▶   |    |
| <b>scienco</b> .....  | 20 |
| - MEDICINO: - Neatenditaj epidemiigoj pro tekniko (Kovrilo)<br>- Ĉu la infana paralizo malaperos? |    |
| - OESTROGENO: Akcelilo de cerbokreskado   |    |
| - ORIENTADO: Respondas la GPS-satelitaro ▶  |    |
| <b>hobio</b> .....  | 24 |
| - VENEZUELO: Serpentoj  |    |
| <b>novelo</b> .....   | 25 |
| - de PEJNO Simono: La profeta kurso (Parto1)  |    |
| <b>arto</b> .....   | 28 |
| - Tri variantoj de unu bildo  |    |
| <b>libroj</b> .....   | 29 |
| <b>informoj de l' MONATO</b> .....  | 33 |
| <b>ŝerco &amp; satiro</b> .....   | 34 |





# Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:  
Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen  
Tel:+32 3 234 34 00  
Reto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:  
81 EUR + afranko  
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:  
81 EUR + afranko  
Prezo de lecionoj 9 ĝis 12:  
81 EUR + afranko

## ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne brem-

sas la disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

**Prof. Duncan Charters**

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



# La mi-demokratio

La klara, kvankam ne komplete triumfa venko de Silvio Berlusconi [berlusconi] en la italaj elektoj markis pluan paŝon en tiel nomata televidokratio. Favorate de balotsistemo simila al tiu en Britio, la televida heroo sukcesis persvadi elektantojn, ke nur la „varo” Berlusconi (kaj lia parti-grupo, kun nov-nov-faŝistoj) estas vere aĉetinda. Programo politika? Estas superflua - „mi estas la programo” sufiĉis por reklamkampanjo simila al tia pri lavpulvoro.

## Ĉiuj povoj en unu mano

Kulmino de tia mi-kulto estis solena subskribo de „kontrakto” de Berlusconi kun la „popolo” en speciala televidspektaklo. La klara mesaĝo estis, ke ne leĝdona instanco, do la parlamento, nek la ekzekutivo, do registaro kun ministroj, decidis pri la sorto de la italoj. Ĉar li krome estas la itala komercisto kaj plej riĉa entreprenisto kaj ĉar li dominas preskaŭ ĉiujn amaskomunikilojn, en li unuiĝas ĉiuj gravaj povoj de la lando, escepte de justico, kiu persekutas lin (kaj kiun tial li minacas per fortaj insultoj).

Sed ankaŭ en aliaj tradiciaj okcidentaj demokratioj ni vidas tendencon al tia mi-ismo. Memoru la duelon inter preskaŭ samaj rivaloj George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] kaj Al Gore [el gor]; ankaŭ en tiu usona elektokampanjo tute malgravis programoj de partioj respublikana kaj demokrata. Temis nur pri tio, kiu el la du kandidatoj pli brile prezentiĝas en amaskomunikiloj, unuarange kompreneble en televido. Simile la tradicia (nov)laborista partio de Britio neglektis kiel en la antaŭa ankaŭ en la ĉi-jara elektokampanjo sian politikan programon favore al nura elstarigo de la stelulo Tony Blair [teŭni blea].

## Konsentpolitiko

Alia registo, kies plej grava instrumento ankaŭ estas televido, germana kanceliero Gerhard Schröder [ŝreder], trovis kroman rimedon por realigi siajn ideojn preter kaj praktike sen la parlamento: tiel nomatajn interkonsentajn rondojn. Tie li traktis kaj traktas ĉiujn gravajn temojn por trovi solvon, kiun poste li prezentas kiel definitivajn al la deputitoj. La parlamentanoj de l' koaliciaj partioj (socialdemokratoj kaj verduloj) povas nur diri „jes” - se ili dirus ne, ili riskus damaĝi la reputacion de sia kanceliero. Tiel okazis ekzemple ĉe la temoj senlaboreco, atomenergio kaj reformoj de impostoj kaj de pensi-asekuro; la saman rimedon li aplikas pri enmigrado kaj gentekniko.

En la rondo pri atomenergio ekzemple la kanceliero (kun la koncerna ministro) marĉandis kun reprezentantoj de energi-industrio pri malkonstruado de atomcentraloj. Rezulto estis „interkonsenta kompromiso”, laŭ kiu iam en fora estonteco Germanio ne plu havos atomenergion - kaj la kanceliero jen staris triumfe anoncante, ke li venkis kontraŭ ekologiaj danĝeroj. La opoziciaj partioj, cetere, en tiu tuta afero ludis nenian rolon.

## Ekster parlamento

Tamen, ĉe aliaj temoj, por kiuj la kanceliero bezonas ankaŭ la voĉojn de l' opozicio, li invitas al koncerna konsentrondo ties ĉefojn - ekster la parlamento, kompreneble. Tiel li agis ĉe la temoj impostoj kaj pensioj. Ĉe aliaj temoj li trovis novan varianton: kancelierajn komisionon kaj konsilantaron. Por sia komisiono pri enmigrado kiel prezidanton li vokis renomman politikistinon de opozicia kristandemokrata partio. Pri gentekniko li fondis etikan konsilantaron de fakuloj, kvankam la parlamento havas propran enketkomisionon pri gentekniko kun ekzakte la sama tasko.

Nur nun, fine, la opoziciaj partioj rimarkis, ke la mi-demokrato fakte provas bagateli la povon de l' parlamento. Normale en Germanio leĝoprojekton proponas aŭ la registaro aŭ grupo da deputitoj al la parlamento, kiu diskutas kaj laŭ fiksita procedo fine decidas. La parlamento por la diversaj temoj havas koncernajn komisionojn, kiuj povas inviti fakulojn kaj organizaĵojn, kiuj rajtas prezenti siajn argumentojn kaj kritikojn kaj fari proponojn por ŝanĝoj de leĝprojekto. Poste la komisionoj prezentas la definitivajn tekstojn al la parlamento, kaj la pleno decidas. Tio estas la normala sistemo de leĝfarado en parlamenta demokratio, en kiu la povo estas dividita inter leĝfara instanco kaj plenuma instanco (ekzekutivo, do registaro kaj ŝtata administrado). Certe, tiel fari leĝojn ofte estas pena kaj longtempa afero, precipe ĉar en tia sistemo ankaŭ opoziciaj partioj disponas pri forta pozicio.

Kion praktikas la mi-demokratoj, vundas sencon kaj esencon de parlamenta sistemo, en Germanio fakte jam preter la konstitucio. Jam foje ĝi havis mi-demokratitan kancelieron, kiu senpovigis la parlamenton kaj poste regis diktatore. Lia nomo estis Adolf Hitler. Li ne disponis pri televido, sed ankaŭ sciis lerti uzi la tiutempajn amaskomunikilojn ...

Stefan MAUL





# Lernu la germanan!

Lingvopolitiko en Germanio iĝas pli kaj pli ĥaosa. Jen dum „Eŭropa Jaro de Lingvoj” kulturpolitikistoj postulas, ke germanoj lernu minimume du fremdajn lingvojn, (kompreneble) la anglan kaj lingvon de najbara lando.

Jen tamen aliaj politikistoj arde postulas, ke ĉiuj enmigrintoj nepre lernu la germanan; sed samtempe en germanaj universitatoj oni instruas jam plurajn fakojn nur per la angla, kaj en federacia lando Baden-Virtembergo eĉ instaligis, kun financa subteno de la registaro, privata universitato, kie oni instruas ekskluzive per angla lingvo. Tamen jen germana registaro protestas, kiam dum EU-konferencoj oni ne tradukas el angla en germanan lingvon, kvankam ĝi estas (tiel oni argumentas) la plej amase parolata en Eŭropa Unio.


## Ne senpage

Kursojn pri germana lingvo por eksterlandanoj postulas politikistoj de preskaŭ ĉiuj partioj, sed neniu el ili volas, ke oni ofertu ilin senpage (kiel en aliaj EU-landoj). Kostus miliardojn da eŭroj, kaj en ŝtataj kasoj mankas mono. Eksterlandanoj devas pagi kelkajn milojn da markoj por kurso mem – kion nur malmultaj faras. Precipa argumento por la kursoj estas, ke, sciante la germanan, enmigrintoj kapblas vere integriĝi en la socio de la lando. Kelkaj krome insistas, ke en tiaj kursoj eksterlandanoj devas ekkoni ankaŭ la germanan kulturon.

Je senpagaj kursoj tamen rajtas nur germandevenaj eksterlandanoj, ekzemple amase alfluantaj homoj el Rusio. Kurioze estas, ke pro troa venemo de „germanoj” el tiu lando oni enkon-

dukis lingvoteston: nur tiu, kiu pravas minimume rudimentan scion de germana lingvo, rajtas veni al la „hejmlando”. Sed en tia testo devas sukcesi nur familiestro; aliaj familianoj tiam ankaŭ rajtas enmigri – aŭ, se unu familiano sola venis al Germanio, poste rajtas sekvi la tuta klano, sen scio de la germana.

Oni loĝigas la „rusojn” kutime samloke – tie ili restas inter si, parolante



gajni monon

venis al Germanio – ekzemple miliono da turkoj – ne havas intereson lerni la germanan. La viroj, kiuj laboras kutime en postenoj, kiuj ne postulas grandiozan kvalifikon (kaj tial ne altiras germanojn), devas scii la germanan nur rudimente, iliaj familianoj tute ne, ĉar ankaŭ turkoj (simile kiel „rusoj”) kutime vivas en iuspecaj getoj. Infanoj iel-tiel lernetas la germanan pro kontaktoj kun germanaj ludkamaradoj, sed iliaj patrinoj tute ne. Eĉ se ili volus, edzoj tre ofte malpermesas, ĉar la virinoj devus forlasi la loĝejon por kurso kaj tie ekhavas danĝerajn (t.e. ne-islamajn) kontaktojn kaj influojn.

Kiel ajn, estas evidente, ke Germanio havas lingvajn problemojn. Kiel solvi

ilin? Precipe per lernado de la angla lingvo, kiu ĝis nun kutime estas instruata ekde 4a aŭ 5a lerneja jaro. Laŭ oni-diroj jam ĉiuj plenkreskaj germanoj scias ĝin – aŭ tamen ne? Kiam germana ministro pri eksterlandaj aferoj en Barato varbis komputilajn specialistojn veni al Germanio, kie oni urĝe bezonas tiajn fakulojn, kaj eventualaj kandidatoj asertis, ke en Germanio ili havus problemojn pro la lingvo, li refutis: „Sed germanoj ja scias la anglan!” Ho, ve! Barata sciencisto, kiu dum kelka



nur la rusan, ne vidante bezonon kaj rifuzante lerni la germanan. Cetere, ili praktike ne bezonas labori, ĉar la ŝtato pagas al germandevenaj enmigrintoj ĉion. Ne mirige, ke ĉirkaŭe loĝantaj germanoj malŝatas la „rusojn” kaj furiozas, kiam junuloj (kiuj pro sia aĝo ne plu devas frekventi lernejojn) pro enuo krimas.

## Mankas intereso

Simile enmigrintoj, kiuj precipe por



tempo vivis en Germanio, avertis: „Jes, miaj kolegoj en la instituto sciis la anglan, sed surstrate, en vendejoj, en restoracioj oni ne komprenis min. Ne eblas vivi en Germanio sen scio de la germana!” Laŭ enketoj, cetere, 40 % de plenkreskaj germanoj asertas pri si mem scii la anglan.

### Ekde unua klaso

Do nun oni ĉiamaniere akcelas lernadon de la angla en Germanio. Oni eksperimentas en infanĝardenoj, ĉar tie etuloj „lude” povas lerni fremdan (anglan) lingvon. Kaj nun sekvas la dua paŝo: instruado de la angla ekde la unua klaso en elementaj lernejoj. Paradokse, federacia lando Baden-Virtembergo, rekta najbaro de Francio, avangardas tiukampe. Ekde la venonta aŭtuno, kiam komenciĝos nova

## lome idiome

Neniam ekde la fondiĝo de la moderna irlanda ŝtato ekzistis kohera kaj konsekvenca lingva politiko. Kvankam la du plej grandaj politikaj partioj havas irlandgaelajn nomojn – *Fianna Fáil* [fjanna fojl] („militistoj de l' destino”) kaj *Fine Gael* [gejl] („gaela klano”) – ili ĉiam montris malkonstantan sintenon rilate la irlandan lingvon.

Laŭ la konstitucio de la Irlanda Respubliko la gaela (irlanda) estas la unua oficiala lingvo de la ŝtato. La dua oficiala lingvo estas la angla. Laŭleĝe ĉiu civitano, pledante aŭ sin defendante en kortumo, rajtas uzi aŭ la anglan aŭ la irlandan, kaj ĉiu leĝo aprobita de la leĝdonanta instanco devas esti redaktita kaj en la angla kaj en la irlanda. Sen tiu ĉi dulingveco la leĝo estus senvalora.

Tamen, post la jaroj 1930aj, la koncerna lingvo-paragrafo de la konstitucio estis neglektata: plurfoje novaj leĝoj estis publikigitaj nur en la angla. Nun, tamen, post pledo de privata ŝtatano, la supera kortumo deklaris, ke tiu ĉi paragrafo devas esti respektata kaj obeata. Defendantoj de la irlanda lingvo esperas, ke registaroj antaŭ kaj ontaj adoptos pli pozitivan kaj aktivan sintenon rilate la nacian lingvon.

Garbhan MACAOIDH

### NOV-ZELANDO

# Daŭras la direkto

La nov-zelanda ministro pri financo Michael Cullen [majkl kalin] promesis tedan buĝeton – kaj tedan buĝeton li liveris. Antaŭ malmultaj jaroj buĝeto restis sekreto ĝis la publikigo, sed nuntempe la ĉefaj ŝanĝoj estas jam anoncigitaj dum antaŭaj semajnoj.

Per la buĝeto de 2000 la nova registaro celis ŝanĝi la direkton de Nov-Zelando: ĉi-foje ĝi volis daŭrigi ĉi tiun direkton. Pasintjare la registaro disdonis monon por subteni novajn programojn; ĉi-jare mankis mono, tamen planataj estas iniciatoj rilate ekzemple al kampara evoluigo, esplorado, sanprovizo, helpo por „problemo”-familioj, polico, nova maoria televida kanalo kaj sporto.

### Senlaboreco

Lastjare komercistoj plendis, ke la registaro ne sufiĉe atentis komercon. Tamen senlaboreco falis de 6,8 % en 1999 al 5 %, kaj komercistoj plejparte prosperas. Malgraŭ necerta monda ekonomio, precipe en Usono, la registaro insistis, ke per sia dua buĝeto – anoncita en majo – ĝi volas kaj starigi fidindan administradon kaj transformi la ekonomion.

Do por helpi eksportadon la reg-

istaro strebas plibonigi rilatojn kun aliaj landoj. Ĝi havas novan interkonsenton kun Singapuro, kaj celas alian kun Honkongo. La ĉefministro Helen Clark [klak] vizitis aziajn landojn inkluzive de Ĉinio kaj Koreio.



Michael Cullen.



Helen Clark.

### Pacsubtenado

Aliaj iniciatoj diskutotaj inkluzivas pagatan forpermeson por novaj gepatroj, modernigon de aer- kaj mar-armeoj por ilin konformigi al realaj postuloj, ekzemple pacsubtenado en Kosovo aŭ Orienta Timoro, kaj „kuracadon” de la sanservo: pacientoj atendas foje ĝis 18 monatoj, antaŭ ol esti ekzamenataj de specialisto.

Malgraŭ tio, ke la registaro prognozis ekonomian kreskon de 2,6 % kaj etan malaltigon de senlaboreco, la buĝeto ne plaĉis al ĉiuj. Strikis dum duontagoj studentoj kaj stabanoj en unu universitato, dirante, ke la monprovizo por universitatoj ne sufiĉas por

daŭrigi eĉ nunajn kursojn. Nuntempe studentoj prunteprenas monon por financi siajn studojn kaj, pro la grandaj ŝuldoj, multaj diplomitoj eliras la landon.

D. E. ROGERS

lernoĵaro, ĉiuj unuaklasanoj en Baden-Virtembergo estos instruataj pri du lingvoj: germana kaj angla.

Sed instruistoj lamentas, pro malbonaj spertoj. Daŭre kreskis la nombro de infanoj, kiuj ne scias la germanan; esploroj montras, ke precipe en urboj negermanaj infanoj en unua klaso de elementa lernejo tute ne kapablas paroli germane. En la baden-virtemberga ĉefurbo Stuttgart [štutgart] ekzemple estas 37 %, en ĉeflernejoj eĉ 55 % da eksterlandaj infanoj. Kio precipe konfuza, estas la stranga fakto, ke eĉ turkaj infanoj de la tria generacio

ne scias la germanan. Estas idoj de patrinoj, kiuj naskiĝis en Germanio kaj bone scias la lingvon de la lando, sed kun siaj infanoj parolas nur la turkan. „La tuta klaso suferas, kiam kelkaj lernantoj ne scias la germanan”, diras fakulo de la ministrejo pri kulturo en Stuttgart. Tial, okaze de bezono, lernejoj proponas ekstrajn kursojn pri la germana por eksterlandanoj.


En tia situacio, ĉu ne estus pli prudente tute rezigni pri instruado de la germana kaj ekde unua lerneja jaro instrui al ĉiuj nur la anglan?

MAUL Stefan



# Venkas apatio, male demokratio

Forlasis la britan parlamenton post preskaŭ duonjarcento da politika laboro la veterana deputito kaj iama ministro Tony Benn [toni ben]. Adiaŭante siajn kolegojn dum unu el la lastaj parlamentaj sesioj antaŭ la ĵus okazintaj naciaj elektoj, Benn memorigis, ke en Britio komence de la 20a jarcento homoj mortis por akiri la rajton voĉdoni, kaj li petis, ke britoj ne apatie rezignu pri voĉdonado sed iru ĉiuj al la urnoj.



Tony Benn.

**E**ble surprizas peto tia, tamen en Britio post la dua mondomilito iom post iom falas la partoprenado en tutlandaj elektoj. Multas la kialoj: parte temas pri neproporcia voĉdona sistemo, kiu signifas – laŭ spertuloj – ke la elekto-rezulto kaj sekve la registaro povas esti determinita de nur kelkmiroj da elektintoj en manpleno da t.n. ŝlosilaj elekto-distriktoj. Alivorte: plejparte en britaj urboj kaj komunumoj oni scias, kies kandidato venkos, kaj, ĉar la voĉoj gajnitaj de opoziciaj, venkitaj kandidatoj poste nulas (ili ne kunkalkuliĝas ekzemple por elekti „listo“-kandidatojn aŭ membrojn de supera ĉambro), homoj perdas intereson pri elektoj, dirante – iagrade prave – ke ili neniel povas influi la demokratian vivon de sia lando (laŭ opinio-sondaĵo tion kredas tri el kvar britoj).

## Korupteco

Ankaŭ kontribuas al indiferenteco flanke de la elektantaro la vidateco de politikistoj, ne nur membroj de la dekstrema Konservativa Partio, kiu malvenkis post la lastaj elektoj en 1997 principe pro la korupteco de kelkaj ministroj kaj eksministroj, sed lastatempe ankaŭ membroj de la reganta Laborista Partio aŭ, kiel ĝi nun duonoficiale nomiĝas, la Novlaborista Partio.

Kaj ĝuste tiel – ekzemple en la nomŝanĝo – kuŝas la problemo. La Novlaborista Partio, estrata de Tony Blair [toni blea], prezentas en la okuloj ne nur de siaj kontraŭuloj sed ankaŭ foje de siaj membroj, stilon kaj ne substan-

con, pantomimon kaj ne politikon. Ekzemple: Blair lanĉis sian elekto-kampanjon en porknabina lernejo, distrumpetante siajn ideojn antaŭ enuigataj lernejaninoj tro junaj por voĉdoni. Sed Blair sciis, ke kameraoj akompanos lin, ke en televidaj novaĵoj oni vidos lin ĉirkaŭata de junulinoj de diversaj rasoj, kantanta pri homamo, preĝanta por paco kaj ŝajniganta intereson pri edukado. Tiel estas la mesaĝo masaĝata, tiel estas plej gravaj aferoj nur implicataj, neniel esprimataj, kaj tiel esenco al emocio cedas. Rezulte: la brita popolo ne plu fidus siajn politikistojn – laŭ opinio-sondaĵo 65 % da britoj taksas politikistojn nefidindaj.

## Triumfo

Do en 1997 voĉdonis 71 % de la

elektantaro, en 2001 nur 59 %. Malgraŭ tio, ke la reganta Novlaborista Partio – samkiel en 1997 – lavange venkis (la disdivido de parlamentaj mandatoj nur etete ŝanĝiĝis) kaj gajnis kun 42 % de la voĉoj 413 seĝojn, la partio pro ĉeurna apatio estas subtenita de nur 25 % de la tuta popolo (en 1997 de 32 %). Kvankam triumfo por Blair (kies partio unuafoje en ĝia historio estas tiel konvinke reelektita por dua, sinsekva parlamenta sesio), la ĉefministro scias, ke lia registaro estas nur tolerata, neniel ŝatata, kaj ke li devos iel entuziasmigi aparte junajn voĉrajtigitajn (nur 38 % de tiuj inter 18 kaj 24 jaroj voĉdonis).

La ĉefopozicia, konservativa partio iam regata de s-ino Thatcher apenaŭ progresis: ĝi pli-malpli retenis sian parlamentajn mandatojn (166 seĝojn)



Tony Blair: pantomimo anstataŭ politiko.



kun 33 % de la voĉoj. Ĝia estro tuj post la balota katastrofo ekzigis: sekvos ne-certa periodo, dum la partio serĉos novan estron. La centra-maldekstra liberal-demokratia partio firmigis sian pozicion kaj, akirinte sep novajn mandatojn, kaptis kun 19 % de la voĉoj entute 52 seĝojn.

Eta kaj nova partio, kiu kampanjis por sendependigi Brition disde la Eŭropa Unio, plene fiaskis (samkiel la konservativa strategio por „savi la pundon“): tio devos kuraĝigi ankoraŭ heziteman ĉefministron pli pozitive argumenti por la eŭro kaj ĝenerale por Eŭropo. Verduloj apenaŭ videblis; nur la faŝisma Brita Nacia Partio tie kaj tie montris pli malagraban flankon de eble la plej apatia, la plej indiferenta elekto-kampanjo en la historio de Britio.

Paul GUBBINS

## SLOVENIO

### Ĉu bonvena?

Nur 35 % de loĝantoj de Eŭropa Unio (EU) subtenas – kaj ĉ. 40 % kontraŭas – slovenan EU-aligon. Trovitaĵoj de la t.n. „eŭrobarometro“ (kiu esploras inter EU-loĝantoj pri diversaj temoj, inkl. pri kandidataj landoj de EU) montras, ke malgraŭ tio, ke Slovenio estas ekonomie la plej forte evoluinta eks-socialisma kandidato-lando, jare superanta pokape 11 000 dolarojn da malneta nacia enspezo, ĝi ne havas altan rekoneblon inter EU-loĝantoj.

Eŭropanoj verŝajne ne subtenas Slovenion pro tio, ke ĝi estas relative nova ŝtato, malgranda kaj sen problemoj, do sen skandaloj, pri kiuj la publiko interesiĝas. Loĝantoj de EU apenaŭ scias pri ĝia ekzisto: ili ne scias, ekzemple, ke en Slovenio troveblas la plej malmultekosta benzino en Eŭropo, ke en ĝi okazas plej malmultaj auto-ŝteloj kaj vivas plej malmultaj malliberigitaj proporcie al la loĝantaro.

Eĉ najbaroj malmulton scias. Aŭstrio subtenas slovenan EU-eniron, tamen nur unu triono de aŭstroj konas la plej elementajn faktojn pri Slovenio. Hazaŭda enketo en Vieno inter deko da junaj gelnantoj montris, ke neniu el ili scias, kie troviĝas Slovenio.

Zlatko TIŠLJAR

## NORD-IRLANDO

### Bataloj de la floroj

Anoj de la regiona asembleo en Nord-Irlando furioziĝis, kiam ili devis interrompi siajn paskajn feriojn por reveni laŭ instigo de la



Abomenata lilio.

Demokrata Uniista Partio (DP) al la parlamentejo. La partio, la plej necedema el la diversaj grupoj uniistaj (porbritaj kaj kontraŭ-respublikaj), protestis kontraŭ floraranĝo ĉe la parlamentejo kaj postulis, ke tieaj blankaj paskaj lilioj estu forigitaj.

En normalaj landoj, floroj malofte disputigas. Tamen blanka lilio memorigas en Irlando pri respublikistoj mortintaj dum la t.n. paska ribelo, kiu kondukis al sendependiga milito. La lilio, simbolo kara kaj grava al nordirlandaj respublikistoj, estas abomenata de lojalistoj (tiuj lojalaj al brita, monarka Ulstero).

Finfine la asembleo decidis, ke floroj estas floroj kaj lasis la liliojn. Espereble tiel finiĝas la batalo de la floroj. Garbhan MACAOIDH

## MEZ-EŬROPO

### Kiel esti hungaro?

La hungara parlamento diskutas gravan leĝon pri hungaroj loĝantaj en najbaraj landoj. Laŭ la leĝpropono, tiel nomataj minoritataj hungaroj en ekzemple Slovakio ricevos legitimilojn, per kiuj ili rajtos favore uzi difinitajn sanservojn, laborlokojn kaj lernejojn en Hungario. Krome, se loke la gefiloj lernas en hungarlingva lernejo, Hungario donos jare proksimume egalvaloron de po 65 usonaj dolaroj. En Eŭropa Unio tiu ĉi sumo estas bagatela, sed kelkloke ĝi povas egali monatan salajron.

Oni timas, ke tiel kreskos la nombro de hungaroj. Leviĝas la demando: kiu estas hungaro? Kredeble tiu, kiu parolas hungare. Sed ofte oni lernas la hungaran lingvon por akiri laboron aŭ lokan kontakton. Daŭras la diskuto en kaj ekster la parlamento; tamen plej verŝajne oni aprobos la leĝproponon, ĉar el ses politikaj partioj kvin ĝin subtenas.

Karlo JUHÁSZ/pg

# Monato

## KONEKTIĜI

- ▶▶ **KOLOFONO**  
La bazaj informoj pri MONATO.
- ▶▶ **SPECIMENOJ**  
Specimenaj tekstoj el MONATO.
- ▶▶ **TARIFO**  
Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.
- ▶▶ **PERANTOJ**  
Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.
- ▶▶ **ABONILO**  
Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!
- ▶▶ **REDAKTOROJ**  
Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.
- ▶▶ **MANUSKRIPTOJ**  
Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.
- ▶▶ **KONVENCIOJ**  
Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.
- ▶▶ **ANONCOJ**  
Anonctarifoj de MONATO.
- ▶▶ **INDEKSOJ**  
Indeksoj de MONATO por retrovi aperintajn artikolojn.
- ▶▶ **RADIO POLONIA**  
Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.
- ▶▶ **ETIKO**  
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoskita de MONATO).

## 24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>



# La ĉina bilomerkato

Antaŭ dek jaroj la ĉina bilomerkato naskiĝis kiel bebo el akuŝantino post forta koliko. Ĝi simbolas ke Ĉinio transformis planizitan ekonomion en merkatan ekonomion. Tio estas unu el la gravaj paŝoj por aliĝi al la internacia socio.

**E**kde tiam, la akcioj reale eniradis en la vivon de pli kaj pli multnombraj riĉiĝantaj ĉinoj. Krom mondepono en bankoj, ili havis plian investan kampon. Ĝis nun oni nombras 58 milionojn da popolanoj investantaj en la bilomerkato. Videblas, ke altiĝoj aŭ faloj de indicaj ciferoj tiras la koron de sennombraj investantoj. Pro tio oni pli kaj pli prizorgas la ekonomion kaj la politikojn en- kaj eksterlandajn, atentante pri la funkcia stato de la akciaj kompanioj, kaj aktive lernas sciojn pri financo kaj investo. Oni progresigas per sia labor-enspezo la bilomerkaton, ja esperante riĉan rikolton!


## Borsoj, bilo-specoj kaj -kvantoj

En la ĉina bilomerkato ekzistas du borsoj: la Ŝanhaja Bilo-Borso (ŜBB, fondita en 1990) kaj la Ŝenzhen-a Bilo-Borso (SBB, fondita en 1991). En la komenca periodo estis nur iom pli ol dek akciaj kompanioj kies kurzoj estis kvotitaj en la du borsoj, sed nun la nombro superas 1100. Inter ili estas 163 altgradaj kaj avangardaj scienc-teknikaj kompanioj.

ŜBB havas 651 bilojn. Inter ili estas 568 A-akcioj, 55 B-akcioj (operacioj per usonaj dolaroj, nun ankaŭ aĉetebraj de enlandaj ĉinoj), 18 fermitaj fondusoj kaj 10 obligacioj. SBB havas 584 bilojn. Estas 500 A-akcioj, 58 B-akcioj (operacioj per honkongaj dolaroj), 18 fermitaj fondusoj kaj 8 obligacioj.

El la cirkulanta akciaro la bank-akcio

*Shen Fa-zhan* estas la plej multnombra kun 1390 milionoj da akcioj. La kemiaĵa akcio *Jiaodai Gufan* estas la plej malmultnombra kun 8,3 milionoj da akcioj. La scienc-teknika *Huagon* estas la plej mult-



La bursa operaciejo de Ŝanhaja Bilo-Borso.

kosta kun akcia prezo de 50 juanoj. La ŝtal-akcio *Magang Gufen* estas la plej malmultkosta kun akcia prezo de 3,98 juanoj. La meza prezo de la akcioj atingas ĉ. 15 juanojn.

La totala akcia valoro en la du biloborsoj superas 5000 miliardojn da juanoj, t.e. pli ol 50 % de la totala valoro de la nacia produktado. Videblas ke la ĉina bilomerkato funkcias kiel barometro de la ekonomio.

## Specoj de investantoj

Estas du specoj de investantoj: kolektivaj kaj individuaj. Entute estas 58 milionoj; inter ili troviĝas ĉ. 360 000 investantoj el diversaj organizoj.

Kun pli ol 2600 branĉoj sub si, la 102 valorpaperaj kompanioj havas totalan kapitalon de 575 miliardoj da juanoj. La plej

granda el ili estas *Yinbo* kun registrita kapitalo de 4,5 miliardoj da juanoj. 34 fermitaj investaj fondusoj havas kapitalon de 70 miliardoj da juanoj. *Tria-kategoriaj entreprenoj* al kiuj la ĉina registaro permesis eniri la bilomerkaton havas kapitalon

de pli ol 100 miliardoj da juanoj.

Inter la individuaj investantoj estas laboristoj, kamparanoj, administrantoj de entreprenoj, teknikistoj, oficistoj, profesiaj investantoj, privataj komercistoj kaj entreprenistoj, mastrumantinoj, senlaboruloj, k.a.

La kolektivaj investantoj tenas proporcion de nur iom pli ol 10 % de la bilomerkato. Ĉefaj investantoj restas la pli ol 50 milionoj da unuopuloj. Laŭ statistikoj, en Usono kaj Japanio la kolektivaj investantoj tenas proporcion respektive je pli ol 45 kaj 42 % de la bilomerkatoj. Tio montras ke en la ĉina merkato restas vasta spaco por kolektivaj investantoj. Pasintjare prezidanto Zhou Xiao-chuan de la Ĉina Bilo-Inspekta Komitato (la plej alta instanco de la ĉina bilomerkato) kelkfoje emfazis ke super-routine multiĝu la organizaĵaj investantoj.

## Malfermitaj kaj fermitaj fondusoj en Ĉinio

|                        | Malfermita Fonduso                                  | Fermita Fonduso                |
|------------------------|---|--------------------------------|
| <b>Grandeco</b>        | Ŝanĝebla  | Fiksa                          |
| <b>Prezo</b>           | Laŭ neta valoro + formalaja maklerpago              | Laŭ proponado kaj postulado    |
| <b>Operacia rimedo</b> | Per banko difinita de la administra fondus-kompanio | Kiel de akcio                  |
| <b>Tempolimo</b>       | Senlima   | Ĝenerale limiĝas al 5-10 jaroj |
| <b>Sekureco</b>        | Sen devaluta risko                                  | Kun devaluta risko             |
| <b>Cirkulado</b>       | Vigla   | Malpli vigla                   |



# Leksikono

**Akcio:** Parto de la kapitalo de akcia kompanio; atesto pri tia kapitalparto (IKEV)

**Biloj (= valorpajeroj):** Rajtoj pri kapitalo, kutime negoceblaj en la borso (v. akcioj, obligacioj) (IKEV)

**Biloborso:** Ejo kie oni negocas valorpajerojn; la operacioj mem (IKEV)

**Borso:** Kunveno de komercistoj, makleristoj, kasistoj kaj aliaj personoj, kiuj komercas valorpajerojn aŭ diversajn varojn; la konstruaĵo kie tia kunveno okazas; la transakcioj mem (IKEV)

**Emisio:** Kreo kaj aĉeteblogo de valorpajeroj (IKEV)

**Fonduso:** Kapitalo destinita por aparta, difinita celo (PIV, vidu pli detalan klarigon en tabelo)

**Indica cifero:** Proporcia cifero indikanta la nombran rilaton inter la valoroj de granda en diferencaj momentoj aŭ lokoj. Oni esprimas ĉi tiun proporcion ciferon en procentoj de unu (aŭ de meznombro de pliaj) de la valoroj de tiu granda (IKEV)

**Kurzo:** Borsa aŭ eksterborsa prezo aŭ valoro de akcioj, obligacioj, kambioj, devizoj, mono kaj varoj (PIV)

**Kvoti:** Fiksi kaj konigi prezojn aŭ kurzojn, ĉu oficiale aŭ ne (IKEV)

**Merkato:** La tuto de propono kaj postulo rilate al iu artiklo aŭ grupo de artikloj (IKEV)

**Obligacio:** Valorpajero kiu atestas partoprenon en monprunto. Ĝi naskas fiksan interezon (IKEV)

(IKEV: Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro; PIV: Plena Ilustrita Vortaro)

De januaro ĝis julio de 2000 eniris 74 700 novaj organizaĵaj investantoj en la ĉinan bilomerkaton.

## Operaciado de la borso

Escepte de ŝtate deciditaj ferioj (sabato, dimanĉo, festotagoj) la borsoj funkcias de lundo ĝis vendredo. De 9.15 h ĝis 9.25 h oni enkomputiligas la diversajn malsamajn akcio-prezojn. La plej multnombra el tiuj estas la tiutaga komenca kurzo. Oni faras borsajn operaciojn nur dum kvar horoj tage: de 9.30 h ĝis 11.30 h kaj 13.00 h ĝis 15.00 h.

Por la A-akcioj, fondusoj kaj obligacioj estas minimuma intertempo inter vendo

kaj aĉeto. Bilon aĉetitan en iu tago, oni nur povas vendi la sekvantan tagon.

La amplekso de altiĝo kaj falo dum unu tago estas limigita. La limo por akcioj kaj ST-akcioj (kompanioj kiuj havis deficiton dum unu jaro) estas respektive 10 kaj 5 % dum unu operacia tago. Por PT-akcioj (kompanioj kiuj havis deficiton dum tri sinsekvaj jaroj) ĝi estas 5 % semajne, surbaze de la vendreda komenca kurzo.

En la borso oni laboras pere de komputilo aŭ per operacio-listo sur servo-tablo. De ekstere oni faras borsajn operaciojn telefone aŭ rete.

## La akcia indico dum 2000

Ĉe ŜBB la jarkomenca indico estis je 1368,69 poentoj, la jarfina je 2073,48 poentoj. Tio estas jara altiĝo je 704,79 poentoj aŭ 51,49 %. Ĉe SBB la jarkomenca indico estis je 402,71, la jarfina je 635,73, do altiĝo je 233,02 aŭ 57,86 %. En 2000 estis emisiitaj kaj eniris en la merkaton 11,7 miliardoj da akcioj el 141 kompanioj.

## Antaŭvidoj pri 2001

El vidpunkto de kapital-liverado la ĉefaj elementoj estas:

1. En ĉinaj bankoj kuŝas 6700 miliardoj da juanoj el personaj mond-eponoj. Lastjare plejparto el la ĉ. 600 miliardoj forlasintaj la bankojn iris al la bilomerkato. Antaŭvideblas ke ĉi-jare same multe fluos en la bilomerkaton. Nun la totala B-akcia valoro en la du biloborsoj atingas nur 6 miliardojn da usonaj dolaroj. Dume fine de januaro en ĉinaj bankoj kuŝas 74,93 miliardoj da personaj deponoj en usonaj dolaroj.
2. Ĉi-jare kredeble aperos deko da malfermitaj fondusoj, ĉefe el asekuraj kompanioj kaj socigarantiaj blokoj. Ĉiu el tiuj fondusoj disponos pri ĉ. 5 miliardoj da juanoj.
3. En 2001 oni emisiis akciojn x. kvin valorpajeraĵojn kompanioj, kiuj ricevos pro tio pli ol 20 miliardojn da juanoj. Kapitalaltiĝoj de valorpajeraĵoj kompanioj alportos ĉ. 30 miliardojn da juanoj.
4. Novaj organizaĵaj investantoj enirontaj la bilomerkaton enportos ĉ. 20 miliardojn da juanoj.
5. Laŭ promeso de Ĉinio, post aliĝo al la Monda Organizaĵo pri Komerco eksterlandaj valorpajeraĵoj organizo rajtos okupi specialan sidejon en la borso kaj rekte fari operaciojn kun B-akcioj. Oni starigos kunlaborajn valorpajeraĵojn kompaniojn kaj administrajn fondus-kompaniojn in-

ter Ĉinio kaj aliaj landoj. Tio kondukos eksterlandan kapitalon en la ĉinan bilomerkaton.

Rilate al kapital-postulado menciindas:

1. Akcioj emisiitaj kaj porciumotaj bezonas 150 miliardojn da juanoj.
2. Fondo de nova merkato, simila al la usona NASDAQ, kaj ĝia operaciado postulos ĉ. 100 miliardojn da juanoj.
3. Redukto de ŝtataj akcioj bezonas 20 miliardojn da juanoj.
4. Maklera pago kaj markimposto por borsaj operacioj kostos 85 miliardojn da juanoj.

## Antaŭvidoj por la ĉina ekonomio

La ĉina registaro aktive daŭrigos la finanĉan politikon por stabila valuto. Ĝi grandskale emisios ŝtatajn obligaciojn kaj ĉiuflanke realigos diversajn projektojn por plivastigi enlandajn bezonojn, reguligi strukturojn kaj akceli konsumadon. Ĝi bezonos kapitalon por ekspluati la okcidentan landparton, por plialtigi la bonstatan nivelon de senlaboruloj kaj emeritoj kaj por pliigi la salajron de landinternaj laboristoj.

La aliĝo al Monda Organizaĵo pri Komerco akcelos la enflon de eksterlanda kapitalo kaj rapide multiĝos investoj en altgrada kaj avangarda scienc-tekniko. La restrukturigo de ŝtataj entreprenoj ekefikos. La profito de la akciaj kompanioj ĝenerale altiĝos.

Laŭ antaŭkalkulo de la Monda Banko kaj de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, la ĉina malneta enlanda produkto pliĝos ĉi-jare inter 7,5 kaj 8 %.

## Plia liberigo de la merkato

Por liveri plian investan kampon al enlandaj ĉinoj kaj por progresigi la nacion ekonomion, la Ĉina Bilo-Inspekta Komitato decidis je la 20a de februaro 2001 ke enlandaj ĉinoj rajtos fari operaciojn kun B-akcioj. Tio estis populara afero: de la 26a de februaro ĝis la 26a de marto, ĉ. 500 000 ĉinoj malfermis al si B-akciajn kontojn. Dum la pasintaj dek jaroj nombriĝis nur 280 000 investantoj en B-akcioj!

Rajtas malfermi B-akcian konton la ĉinoj kiuj deponas en banko almenaŭ 1000 usonajn dolarojn aŭ 7800 honkongajn dolarojn. Ne ekzistas monkvanta postulo por malfermi A-akcian konton. HUANG Tingsheng

(La aŭtoro funkcias kiel manipulantato de akcioj en valorpajera kompanio. Li lertas pri aĉeto kaj vendo de akcioj. Interesitoj povas kontakti lin rete: nasko@21cn.com).



# Inkotermoj

En la rubriko „Libroj” en MONATO 2001/3 aperis komentario pri *Inkotermoj* fare de Bruno Flochon.

**M**i kiel unu el la prizorgintoj dankas lin pro la preciza, fakula prezento. Mi tamen estas iom skeptika pri lia profetaĵo, ke „kampanjo por diskonigi Inkotermojn okazos nuntempe en Usono, kaj ni povas esperi, ke tiu ĉi versio estos vere uzata tutmonde”.

En Usono praktikiĝas alia regularo nomata *Usonaj fremdland-komercaj difinoj* („*Revised American Foreign Trade Definitions*”). Jen kion s-ro Flochon kompreneble bone scias. Mi nur volus doni iom da klarigo por laikoj.

Strange, ili estas parto de la tiel nomata *Unuigita komerca kodo* („*Unified Commercial Code*”). Strange ĉar, kvankam ili estas leĝaj, ili ne estas devigaj: ili fariĝas devigaj nur kiam ili es-



Bruno Flochon.

tas enkorpigataj en individua kontrakto. La anglosaksa jursistemo, kontraste al la kontinent-eŭropa, havas tiajn unikajojn. Kial „unuigita”? Ĉar Usono estas vere neunuigita lando, federisma, tiel ke komerca kodo diferencis de ŝtato al ŝtato, komponanta la nordamerikan „Union”. Tio ne estas tre efika en komerco, kie estas postulata efikeco antaŭ ĉio. Ŝtatoj do unuformigis sian kodon laŭ interkonsento.

Tiamaniere, Usono estas preskaŭ la sola lando, kie la Inkotermoj ne regas, ĝuste kiel ĝi estas preskaŭ la sola lando, kie la metra sistemo renkontas persistan reziston. Ĝiaj tre potencaj Usonaj Komercaj Reprezentantoj estas konataj kiel harditaj negocantoj. Onidire (povas esti apokrifaj) ili asertis ke la japana lingvo estas nedoganimposta bariero. Povas okazi ke la Inkotermoj estus deklaritaj de ili kiel nedoganimposta bariero starigita de la eŭropanoj kaj azianoj.

En realo tamen tiu ĉi esceptiĝo ne kaŭzas praktikan obstaklon. Plej multaj difinoj estas similaj. La sola granda malsimileco estas nur unu: la FOB laŭ la usona regulo signifas FCA de la Inkotermoj. Nome, kiam neusonanoj diras „FOB Nov-Jorko”, ĝi signifas, ke la vendanto liveras la varon sur la ŝipo ekveturanta el la haveno de Nov-Jorko, dum usonanoj komprenas, ke la vendanto transdonas la varon sur vagono sidanta en unu el la du fervojstacioj de Nov-Jorko aŭ sur kamiono en la loko interkonsentita inter la kontraktantoj. Se ni inkotermuloj volas diri en la usona lingvo, kion ni komprenas sub FOB Nov-Jorko, ni nur devas diri „FOB ŝipo (‘FOB vessel’) Nov-Jorko”. YAMASAKI Seikō

## KONGO

### Telekomunikadaj entreprenoj multiĝas

**A**ntaŭ 1990 en la Demokrata Respubliko de Kongo nur estis unu ŝtata telefonkompanio. Dum la 1990-aj jaroj naskiĝis la privataj entreprenoj, unue *Telecel*.

La konga ekonomio malsanas i.a. pro manko de sufiĉaj komunikiloj. Ne nur la vojoj estas malbonaj, ankaŭ la telefonreto. Novaj telefonretoj do estis bonvenaj, kvankam ili estis tre multekostaj kaj ne alireblaj por malriĉuloj.

Nun estas ok privataj telefonkompanioj, kiuj plejparte apartenas al eksterlandanoj. Pro la konkurenco la prezoj malaltiĝis kaj multaj kinŝasanoj havas porteblan telefonon. La ŝtata telefonkompanio estas en malfacila situacio, ĉar ĝi ne ofertas tiajn telefonojn.

La interkonekto estas granda problemo. Malgraŭ premo de la registaro, multaj privataj entreprenoj ne ŝatas interkonekton kun aliaj kompanioj. Oni povas rimarki kinŝasanojn kun du aŭ tri porteblaj telefonoj. Tio estas multekosta, sed neevitebla por komercistoj kiuj volas kontakti siajn klientojn.

Zandandu Ntomono ZOLA


## ĈINIO

### Qinghai-Tibeta fervojo konstruota

Antaŭ nelonge la ĉina registaro oficiale sankciis konstruon de la Qinghai-Tibeta fervojo. La komenco de la laboroj okazos laŭplane en la dua duono de 2001.

La fervojo situos sur la Qinghai-

Tibeta altebenaĵo kaj longos pli ol 1100 kilometrojn. Ĝi komenciĝos en la urbo Eemu en Qinghai-provinco kaj kondukos norden



Fina stacio en Lhasa.

ĝis Lhasa, ĉefurbo de Tibeto. Ondante laŭ topografio, la linio devos serpentumi tra altaj montaroj kaj trans danĝeraj riveroj. Ĉar la altebenaĵo estas meznombro 4000 metrojn super la marnivelo, la fervojo efektive troviĝos sur la monda tegmento.

#### Malfacilaĵoj neimageblaj

Tibeto estas la unusola ĉina regiono sen fervojo. Sekve, la malfacilaĵoj de la konstruado estas vere neimageblaj. Oni diras, ke la grandeco estos same malofta en la mondo kiel tiu de la Granda Muro.

Finkonstruite, la linio plibonigos la trafikeblojn kaj multe akcelos la ekonomian disvolviĝon de la naciminoritataj regionoj en Tibeto kaj Qinghai-provinco. Por la ĉina registaro la fervojo havas gravan politikan, ekonomian kaj strategian signifon.

#### Maltrankvilo pro frostinta tertavolo

La nova fervojo nepre trapasos vastan regionon kun dikega frostinta tertavolo. Fakuloj en- kaj eksterlandaj faris kaj faras sinceran konsilon ne komenci la konstruadon antaŭ ol solvi la problemojn kiujn tiu tavolo kaŭzos. Tial multaj personoj volevole dubas pri la fina sukceso de tiu kuraĝiga konstruado.

MU Binghua



SKIADO

# Rompita genuo, rompitaj rekordoj

**Ĉ**iu, kiu interesiĝas pri skiado, konas la nomon de Janica Kostelić el Kroatio. En la monda ski-pokala konkurado de 2000/01 ŝi fariĝis inter virinoj absoluta venkinto. Eĉ pli rimarkinda montriĝis ŝia venko kun 800 poentoj en slalomo: venkinte en ok sinsekvaj slalomvetkuroj, ŝi faris tion, kion neniu jam faris.

Des pli notindas la sukceso, ĉar antaŭ tri jaroj, kiam la juna sportistino havis nur 16 jarojn, ŝi falis dum rapidskiado kaj plurloke rompis al si ge-

nuon. Ĉiu kredis, ke ŝia kariero estas finita. Tamen post operacio en Svisio ŝi plene resaniĝis kaj rekomencis sian trejnadon, tiel ke nun ŝi fariĝis preskaŭ nevenkebla.

En lando, kie apenaŭ ekzistas bonaj kondiĉoj por ski-ĉampiono, neniu volis finance subteni ŝin. Nur la in-



Janica Kostelić, kiu venkis en ok sinsekvaj slalomvetkuroj, fiere montras la kristalan pokalon, kiun ŝi gajnis.

sistemo de ŝia patro, mem sportinstruisto, kaj finfine helpo flanke de la ski-skipo de Slovenio ebligis al ŝi montri siajn talentojn. Sendube la ankoraŭ juna Janica, homo mo-

desta, kiu neniel konsideras sin stelulino, spertos longan kaj sukcesan karieron.

Zlatko TIŠLJAR /pg

OPINIO

## De flegistina vidpunkto . . .

**P**li ol kvardek jarojn mi laboris ĉe litoj de malsanuloj – tiuj, kiuj grave malsanis pro kancero de la laringo. Mi flegis kaj prizorgis ilin ĝis la fino. La malsanuloj estis diversaj, kvankam same malsanaj. Ili stato profunde ŝanĝis la vivon, ĝin limigante. Foje la kancero postoperacie detruis la vizaĝon. Ili sciis pri sia diagnozo, povante rigardi ĝin ĉe sammalsanuloj.

Nun la prognozo de malsanuloj pliboniĝis pro evoluo de medicino, novaj eltrovoj kaj pli kaj pli fajnaj metodoj. Tamen antaŭ dudek jaroj oni povis aŭguri rapidan finon, malgraŭ tio, ke fortaj voluloj kuraĝe kapablis vivi kun perdo de voĉo kun vundo fermita sur la kolo, kiu eterne salivumis kaj malodoris, kaj iam kun tubo en la nazo por nutri sin.

Kelkfoje la familio ne plu volis havi ekzemple sian patron hejme kaj izoligis lin, aŭ malsanulo mem estiĝis kruela diktatoro de familio, postulante servadon tage-nokte de edzino aŭ gefiloj: la familio turmentiĝis eble pli ol la malsanulo mem. Sed pliaj estis tiuj, kiuj akceptis sian malsanon kaj vivis dum monatoj kaj jaroj sen protesto, sen ĝemoj, sen amaro. Tiaj homoj multe instruis min kaj spertigis min. Ili kuraĝigis min helpi novulojn, kiuj ekmalsanis. Mi povis doni valorajn informojn, klarigi eblojn, montri alian flankon de la malsano kaj kompari, konsili, konfidi pri homa vero, pri pacienco.

### Opio

Mi scias, kaj aŭdacas aserti, ke ne ekzistas neeltenebla doloro, grandega doloro, kiu povas kaŭzi deziron aŭ postulon mortigi homon je la nomo de eŭtanazio. Paroli pri tia doloro samas mensogi. Eĉ homoj, kiuj restis sur la

lito ĉe la fenestro kaj ne plu kapablas ekzisti sen porcio da opio, ne meritas aŭdi pri eŭtanazio.

Se ili volas „foriri”, ili tion povas fari mem, sed ili ne rajtas tion fari helpe de alia homo, ĉar tia servo detruas la animon. Multfoje mi aŭdis: „Fratinjo, donu al mi lastan injekton”. Kaj mi tre bone, tre klare sentis: „Ne mortigu, sed sidiĝu, parolu, premetu la manon ... rakontu al mi pri la ĉefa temo de via vivo, faru agrablan minuton, ŝercu ...”. Mi naŭzas, se mi legas artikolojn pri eŭtanazio el la plumoj de sanuloj, por kiuj ideoj pri morto kaj demandoj plene intimaj kaj komplikaj tute ne estas aktualaj. La morto ilin ne tuŝas: ĝi estas nur teoria afero.

### Krimo


Multajn artikolojn mi legis kaj multajn televidajn elsendojn mi rigardis, sed inter ili mankis opinioj de flegistinoj. Mi ne trovis inter ili la opinion de flegistino, kiu ricevis ordonon prepari mortigilon. Mi ne povas eĉ imagi la virinon, kiu ĉiutage flegis pacienton, eĉ agresivan, maldecan, ja maljunegan, kaj kiu povus plu labori kun sana cerbo ĉe sama lito entenanta alian pacienton. Laŭ mi ĉiuj debatoj, ĉiuj diskutoj pri eŭtanazio estas stultaĵoj: la ago mem estas krimo.

Morto ne estas malbona; morti tamen male – aparte sen kunsento kaj kompreno de vivantoj. Verdire kuraci povas esti eĉ pli terura ol la morto, se ĝin realigas fakuloj sen homa sento. Sanuloj nepre tion pripensu.

Jindriska DRAHOTOVA

**Aldonas la aŭtoro:** En Ĉeĥio flegistinoj oni nomas fratino: ne temas pri monaĥino. Cetere, dum kvardek jaroj de profesia vivo en hospitalo, neniu mortonto petis min venigi pastron.





# Historio de la ekonomika pensado

## Parto 5

La 4 unuaj partoj de la serio aperis en MONATO 2 ĝis 5/2001.

# Trarompo de marĝenismo

„Kial akvo, kiu ja estas tiel utila, estas tiel malmultekosta, dum diamantoj, kiuj estas tiel malutilaj, estas tiel kostaj?” Tiun klasikan demandon oni nomas la valorparadokso, kaj oni klarigis ĝin malsame en malsamaj epokoj de la ekonomika pensado.

**J**am Platono aludis en *Eŭtidemo* al tio, ke raraj objektoj estas multekostaj, dum akvo estas malmultekosta, ĉar ĝi ekzistas en granda kvanto. Simile pensis Samuel von Pufendorf en la 17a kaj Adam Smith en la 18a jarcento.

Kun la marĝenismo aŭ novklasikismo en la fino de la 19a jarcento, oni esprimis sin pli precize. La anglo Stanley Jevons [stanli ĝevnz] (1835-1882) konstatis en sia libro *Principles of Political Economy* (Principoj de politika ekonomio, 1871), ke „ni ne povas vivi sen akvo, sed tamen ni kutime ne donas al ĝi valoron”. La kaŭzo estas ke ni havas tiom multe da akvo, ke la lasta litro, t.e.

la marĝena litro, kiun ni uzas dum certa periodo, ne multe gravas. Estas preskaŭ egale al ni ĉu ni havas aŭ ne havas la lastan litron, kaj ni tial taksas ĝin malalte. La prezo laŭ la marĝenismo estas determinita laŭ la malgranda utilo, kiun donas marĝena litro.

Ordinare la provizo de akvo estas granda kaj la utilo de marĝena litro estas malgranda, sed ne ĉiam. „Lasu la provizon fariĝi nesufiĉa pro senpluveco, tiam la utilo de marĝena litro – kaj sekve la prezo – fariĝos alta” diras Jevons.

La rezonado pri la marĝeno estas tipa por tio kio nomiĝas novklasikismo, kaj tial oni alterne uzas la terminojn marĝenismo kaj novklasikismo pri proksimume la sama fenomeno. Tradicie,

sed ne tute prave, oni nomas tri ekonomikistojn fondintoj de la novklasikismo. Jevons estas unu el la tri. La aliaj estas la aŭstro Carl Menger (1840-1921) kaj la franco Léon Walras (1834-1910).

### Plezuro kaj doloro

La bazo de Jevons estis teorio pri plezuro kaj doloro. Plezuro kaj doloro estas ligitaj al varoj kaj agoj. Jevons akceptis la elirpunkton de la filozofo

**'Ni ne povas vivi sen akvo, sed tamen ni kutime ne donas al ĝi valoron'**


STANLEY JEVONS

Jeremy Bentham, kaj li traktis la sentojn kiel kvantojn: „Do, ni povas trakti plezuron kaj doloron tiel, kiel pozitivaj kaj negativaj kvantoj estas traktataj en la algebro.” Kerna punkto estas: „Nia celo ĉiam estas maksimumigi la sumon en la direkto de plezuro, kiun ni konvene povas nomi la pozitiva direkto.”

Ĉar Jevons rigardis plezuron kiel maksimumigotan kvanton, lia pensado estis esence matematika, kaj li emfazis la signifon de matematiko: „Al mi ŝajnas, ke nia scienco devas esti matematika, simple ĉar ĝi traktas kvantojn.” Sekve, en lia libro abundas matematikaj funkcioj kaj derivaĵoj. Derivaĵoj respondas al marĝenaj grandoj en ekonomika analizo.

Ĉe la aŭstro Carl Menger en lia libro *Grundsätze der Volkswirtschaftslehre* (Principoj de ekonomiko, 1871) troviĝas marĝenisma analizo sed ne matematikaj funkcioj. Same estas ĉe liaj aŭstraj samtempaj kolegoj Eugen von Böhm-Bawerk [ojgen fon bem-baverk] kaj Friedrich von Wieser [fridriĥ fon vizer].

Kial estas tia diferenco inter britaj kaj aŭstraj fruaj novklasikistoj? La respondo ne estas evidenta, sed unu klarig-propono estas, ke en la lerneja edukado de junaj britoj natursciencoj kaj matematiko ludis grandan rolon. La aŭstroj, kontraŭe, lernis pli da filozofio en la gimnazio, kaj legis originalajn tekstojn de la antikvaj helenaj filozofoj. Tiu diferenco markis la gimnazianojn kaj restis kiam ili iĝis maturaj homoj. Ĝi tial influis ankaŭ la



**Jeremy Bentham:** provi maksimumigi la plezuron.






Stanley Jevons, ...



... Carl Menger kaj ...



... Léon Walras: la novklasikistoj.

sciencan analizon de universitataj profesoroj.

Alia interesa fakto estas, ke la analizoj de Jevons kaj Menger elkreskis ŝajne sendepende unu de la alia. Menger estis influita de germanaj ekonomikistoj, ĉe kiuj troviĝis elemento de marĝenismo. Jevons konis la britajn klasikulojn, sed ne estis ligita kun ili.

### Ĉio influas ĉion


La lasta en la triopo, Léon Walras, same kiel Jevons estis kaptita de la ideo, ke ekonomiko estu matematika scienco. Kiel junulo li komencis miningenieran studadon, sed interrompis ĝin por okupiĝi pri literaturo, ĵurnalismo kaj sociaj demandoj. Precipe la kooperativismo kaptis lian intereson.

Instigite de sia patro, li meze de siaj dudekaj jaroj promesis okupiĝi pri ekonomiko, sed disipis multan tempon per aliaj okupoj. En la 1860-aj jaroj Walras provis akiri postenon ĉe franca universitato, sed malsukcesis pro manko de formala edukado kaj – laŭ li mem – pro tio ke la ekzistantaj dek du ekonomikaj postenoj ĉe supera edukado en Francio estis okupitaj de ortodoksaj ekonomikistoj, kiuj transigis siajn postenojn al siaj parencoj. Anstataŭe, li en 1870 fariĝis profesoro en Lausanne en Svislando, kaj tie li restis dum sia tuta kariero.

En sia libro *Éléments d'économie politique pure* (Elementoj de pura politika ekonomio), kiu aperis en du volumoj en 1874 kaj 1877, Walras pledis por la marĝena principo. Tamen, lia plej grava kontribuo estis alia. Per Walras la t.n. ĝenerala ekvilibra teorio ricevis matematikan veston. Tio signifas, ke Walras uzis sistemon de ekvacioj por modeligi la ekonomion. Tiu ekvaci-sistemo indikas, kiel la diversaj partoj de la ekonomio rilatas unu al la alia. „Ĉio dependas de ĉio alia”, rekte aŭ malrekte.

### La dua generacio kaj poste

Jevons, Menger kaj Walras estas ofte konsiderataj la unua generacio de novklasikistoj. La dua generacio, kies plej elstara nomo estas la anglo Alfred Marshall (1842-1924), disvastigis la marĝenan analizon. Dum la unua generacio koncentriĝis sur la marĝena utilo de la konsumanto, la dua generacio enkondukis la marĝenan koncepton ankaŭ en la teorion de produktado kaj ofertado. La marĝena produkto – t.e. la aldono al la produktrezulto, kiun kaŭzas la laste dungita laboristo aŭ la lasta maŝino – fariĝis grava koncepto.



Alfred Marshall: plej elstara nomo de la dua generacio.

Produktantoj, kiuj maksimumigas la profiton kaj konsumantoj kiuj maksimumigas la utilon fariĝis la kolumnoj, kiuj portis la teorion.

La novklasikismo estas esence mikroekonomika teoriaro, t.e. ĝi okupiĝas pri unuopaj produktantoj kaj konsumantoj, kaj pri ekvilibro sur la merkatoj. Ĝi akcentas la prezon kiel la plej gravan decidan faktoron kiam temas pri tio, kion oni produkti.

Ĝi ne mortis. En la 20a jarcento ĝi vastigis sian terenon per ekzemple novklasika kreskoteorio. Ĝi ankaŭ pritraktis demandojn kiuj antaŭe estis rezervitaj por aliaj disciplinoj kiel juro, sociologio kaj politika scienco. Pro tio ekonomiko kelkfoje estas akuzata pri scienca imperiismo. Stariĝis novklasikaj subdisciplinoj kiel la ekonomiko pri politika konduto kaj la ekonomiko pri krimo. La Nobelpremiitoj en 1986 kaj 1992, James Buchanan kaj Gary Becker respektive, estas reprezentantoj de tiuj subdisciplinoj.

Granda parto de la literaturo, kiun nuntempaj universitataj studentoj pri ekonomiko devas enkapigi, baziĝas sur la marĝenismaj principoj. Do, la novklasikismo vivas ne malpli longe ol siatempe la klasikismo. Same kiel la klasikismo ĝi ne okupas la tutan scenojn. Al tio ni revenos en posta artikolo.

Bo SANDELIN

Pli ampleksa versio de tiu ĉi serio estos eldonita baldaŭ de la germana eldonejo Leins Verlag sub la titolo „La historio de ekonomika pensado”.



## RUSIO

# La ĉuvaŝa lingvo

Inter pli ol cent lingvoj parolataj en Rusio, la ĉuvaŝa okupas la kvaran lokon kun proksimume 1 800 000 parolantoj. Malgraŭ tio multaj homoj en Eŭropo kaj en aliaj partoj de la mondo apenaŭ aŭdis pri ĝi. Ĝi interesas lingvistojn per siaj historio, gramatika strukturo, fonetiko kaj vortaro.

**N**un la ĉuvaŝa estas unu el la du ŝtataj lingvoj de la Ĉuvaŝa Respubliko (la alia estas la rusa).


Ĉuvaŝio okupas la mezan basenon de la rivero Volgo kaj najbaras kun Tatario kaj la regiono de Niĵnij Novgorod. Laŭ sia statuso ĝi estas lingvo de ŝtataj organoj de la respubliko, lingvo de gazetoj, televido kaj radio. Vizitantoj de la respubliko povas vidi ĉuvaŝlingvajn ŝildojn, reklambildojn kaj surskribojn en urboj, vilaĝoj kaj apud ŝoseoj. Ĉiuj ŝtataj dokumentoj nepre estas skribataj dulingve: ruse kaj ĉuvaŝe.

La ĉefurbo de Ĉuvaŝio estas Ĉeboksari, kiu, kun proksimume 500 000 loĝantoj, estas unu el la kulturaj kaj industriaj centroj de la volga regiono. Tie troviĝas bazaj studlokoj pri la ĉuvaŝa lingvo. Unu el tiuj estas la fakultato de la ĉuvaŝaj kulturo kaj lingvo en la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato. La plej multaj ĉuvaŝlingvaj gazetoj kaj revuoj estas eldonataj en Ĉeboksari. Ĉiutage funkcias ĉuvaŝaj televido kaj radio.

La ĉuvaŝoj (aŭ ĉuvaŝlingvanoj) loĝas ne nur ene de la limoj de la Ĉuvaŝa Respubliko. Fakte ĉi-lastata estas la regiono plej multe loĝata de ĉuvaŝoj. La procento de la loĝantoj apartenantaj al la ĉefa nacio estas la plej alta en Ĉuvaŝio inter la respublikoj de la Rusia Federacio (ĉirkaŭ 68 %). Ekzemple en Tatario nur 48 % estas tataroj. Krom en Ĉuvaŝio la ĉuvaŝoj, pro multaj historiaj kialoj, loĝas ankaŭ en tre diversaj lokoj. Unue, kompreneble, en najbaraj regionoj: Tatario, Baŝkirio, Samara kaj Uljanovska provincoj. Alia granda parto de ĉuvaŝoj loĝas en Siberio (ĉefe en la Tjumena kaj Kemerova provincoj), kien ili translokiĝis ĉefe en la 19a kaj 20a jarcentoj.

## Geneologio

Esploristoj pri la ĉuvaŝa lingvo longe ne povis interkonsenti pri la demando al



La ĉuvaŝa flago.

kiu lingva familio ĝi apartenas. Kulpas iom stranga gramatika strukturo de la lingvo kaj vortaro. Multaj opiniis, ke la ĉuvaŝa estas tjurkigita finno-ugra lingvo, ĉar ĝia gramatiko enhavas kelkajn elementojn de la finno-ugraj (ekz. la negativa formo de imperativo *an*) kaj kelkaj vortradikoj troviĝas ankaŭ en la finno-ugraj. Krom tio multaj diferencoj disde aliaj tjurkaj lingvoj certigas tion. Sufiĉas diri, ke diversaj tjurklingvaj popoloj kutime komprenas unu la alian, sed ne la ĉuvaŝoj). Tamen esploristoj kiel Fejzĵanov kaj N. Aŝmarin argumentis, ke la ĉuvaŝa estas vera tjurka lingvo, postulo de la bolgara, kiu estis la lingvo de la volga bolgara ŝtato. Iam (eble en la komenco de la komuna erao) la tjurkaj lingvoj dividiĝis en la tiel nomatajn r- kaj z-lingvojn. Nur unu moderna lingvo apartenas al la r-lingva grupo de tjurkaj lingvoj – la ĉuvaŝa. Pro tio la ĉuvaŝa konservis multajn elementojn de malnovaj tjurkaj r-lingvoj en la fonetiko, morfologio kaj vortaro. Tial parolantoj de aliaj modernaj tjurkaj lingvoj (z-lingvoj) ne povas kompreni la ĉuvaŝan.

## Literoj

La moderna ĉuvaŝa uzas cirilan alfabeton. La kreinto de la ĉuvaŝa alfabeto estas Ivan Jakovlev, fama ĉuvaŝa klerigisto. Krom la originaj literoj de la rusa alfabeto, la ĉuvaŝa varianto enhavas specialajn literojn: a kun hoketo, e kun hoketo, ipsilono kun du streketoj supre, c kun cedilo, kiuj indikas ĉuvaŝlingvajn sonojn malestantajn en la rusa.

Pro tio, ke la ĉuvaŝa ne havas voĉajn konsonantojn (konsonantoj povas voĉiĝi nur en difinitaj sonkombinoj), tiaj literoj renkontiĝas nur en rusaj vortoj. Same oni povas diri pri la litero y. La litero o montras molecon de antaŭe troviĝantaj konsonantoj en vortoj kun malantaŭaj konsonantoj.

## Prononco

La ĉuvaŝa havas relative malfacilan prononcadon, kiu iom malsimilas al tiu de aliaj tjurkaj lingvoj. La vokaloj estas dividitaj en du grupoj: antaŭaj kaj malantaŭaj. En unu vorto ne povas kunesti vokaloj el diferencaj grupoj (escepte de la vortoj pruntitaj el aliaj lingvoj). La fina vokalo de radiko influas variantojn de afiksoj. Se la fina radikvokalo estas antaŭa, ĉiuj vokaloj en la afiksoj estas ankaŭ antaŭaj kaj male. La originala ĉuvaŝa vorto neniam komenciĝas per voĉa konsonanto kaj per du aŭ pli da konsonantoj. La molecon kaj malmolecon de la konsonantoj difinas la najbaraj vokaloj.

## Gramatiko

Kiel ĉefajn specifajojn de la ĉuvaŝa gramatiko oni povas nombri tiujn de aliaj tjurkaj lingvoj. Tiuj specifajoj estas la jenaj:

- ▶ Ĉefa maniero de vortformado kaj vortŝanĝado estas afiksa. La radiko de ĉiu vorto restas konstanta, neniam ŝanĝiĝas. Ĉiu afikso havas nur unu signifon, kaj ĉiu signifo doniĝas per unu afikso;
- ▶ Malesto de la genra kategorio. La sekso de homoj kaj animaloj doniĝas per specialaj vortoj;
- ▶ Rilatoj inter objektoj esprimiĝas ne per prepozicioj (kiel en plimulto de la eŭropaj lingvoj) sed per postpozicioj, kiuj lokiĝas ne antaŭ, sed post la vortoj;



- Kvalifikantoj ĉiam antaŭas la kvalifikatojn;
- Predikato ĉiam lokiĝas fine de la frazo. Se en Esperanto ni diras „Mi iras hejmen”, ĉuvaŝe oni diras *epe kile kajatap* („Mi hejmen iras”);

- Laŭ la ekstera aspekto de vorto ne eblas difini al kiu vortklaso ĝi apartenas. La nombro kaj konsisto de vortkласoj en la ĉuvaŝa ne tro diferenciĝas de tiuj en aliaj tjurkaj lingvoj. La ĉefaj vortkласoj estas: substantivoj, verboj, adjektivoj, adverboj, pronomoj, numeraloj, verbaj adverboj, participoj.

Kiel kategoriojn de substantivoj oni povas nomi pluralon, apartenon kaj kazon. La sinsekvo de afiksoj donantaj signifojn de tiuj kategorioj diferenciĝas de tiuj en aliaj tjurkaj lingvoj: komence lokiĝas afikso de aparteneco, poste la afikso de pluralo kaj fine la afikso de kazo. Ekz. *tavan+amar+sen+e* (*tavan* parenco, *amar* nia, *sen* afikso de pluralo, *e* al) – „al niaj parencoj”. Aparte menciindas la afikso de pluralo *sen*, kiun oni tute ne renkontas en aliaj tjurkaj lingvoj, kaj ankaŭ la kunfandiĝo de akuzativo kaj dativo en unu formon.

Tre diversforman sistemon kreas la kategorioj de verbo. La plej granda estas la kategorio de tempo, kiun formas la sekvaj bazaj tempoj: prezenco (eblas doni ankaŭ la venontan tempon), futuro, videbla preterito, nevidebla preterito kaj iuj kompleksaj tempoj (delonge pasinta, longdaŭre pasinta kaj aliaj).

Samkiel en aliaj tjurkaj lingvoj la verbo en la ĉuvaŝa havas ankaŭ multe da modoj (imperativo, subjunktivo, kondicionalo, optativo kaj aliaj), kaj kreas t.n. verbidojn: adverbojn kaj participojn.

Unu el la specifaĵoj de la ĉuvaŝa verba sistemo estas specialaj kompleksverbaj formoj, donantaj modajn signifojn kaj ag-aspektojn. Tiuj kombinoj enhavas: ĉefan elementon (kiel regulo particon aŭ verban adverb) kun leksika signifo kaj helpan elementon (finitiva verbo) kun gramatika signifo. Ekz. *ĉupsa kiltem* („mi alkuris”), *vulasa tujĉram* („mi finlegis”), *kiles pulatj* („oni devas veni”) ktp.

La ĉuvaŝa adjektivo povas kvalifiki ne nur objektojn sed ankaŭ agojn. *Lajaĵ aĉa*, *lajaĵ verenetj* („Bona infano, bone lernas”).

Diference de aliaj tjurkaj lingvoj la numeraloj de la ĉuvaŝa povas havi du formojn: ĉefan kaj mallongan. La mallonga formo renkontiĝas ĉe substantivoj: *ikke* („du”), *ike ŝjurt* („du domoj”). La substantivo en tiu okazo ne prenas la afikson de pluralo.



## Influo de aliaj lingvoj

Tre miksa situacio estas observata en la vortaro de la ĉuvaŝa. Kaŭzo de tiu diversformeco estas la historio de la popolo, kiu najbaris kun multaj aliaj. Du ĉefaj grupoj de la ĉuvaŝa vortaro estas: propraj ĉuvaŝaj vortoj kaj depruntitaj vortoj. La lastaj ankaŭ dividiĝas en du grupojn: pruntaĵoj el parencaj tjurkaj lingvoj (antaŭ ĉio de la tatara) kaj tiuj de aliaj neparencaj lingvoj. Laŭ la ekstera aspekto de pruntitaj vortoj eblas diri, kiam ili estis pruntitaj. La vortoj delonge pruntitaj havas jam sonan aspekton laŭ la fonetikaj leĝoj de la ĉuvaŝa kaj ne sentiĝas nun ilia fremda origino. Male antaŭnelongaj pruntaĵoj ankoraŭ konservas sian originan prononcon.

### Ekzemploj:

- Propraj ĉuvaŝaj vortoj: *ŝjin* („homo”), *samsa* („nazo”), *sisna* („porko”), *ŝan* („frostiĝi”) – tiuj vortoj malestas en aliaj tjurkaj lingvoj; *ijt* („demandi”), *ura* („piedo”), *ŝjuŝj* („haroj”), *atte* („patro”), *anne* („patrino”), *her* („filino, knabino”), *ut* („ĉevalo”), *pula* („fiŝo”) kaj multaj aliaj ĝeneralaj tjurkaj vortoj. La vortoj de tiu grupo konsistigas ĉirkaŭ 50 procentojn de la tuta ĉuvaŝa vortaro.
- Pruntoj el aliaj lingvoj:
  - \* el tjurkaj lingvoj (ĉefe el la tatara): *jalan* („ĉiam”), *jultaŝ* („amiko”), *javaŝ* („malrapida”), *sara* („flava”), *alak* („pordo”), *akaŝ* („cigno”) kaj aliaj;
  - \* el netjurkaj lingvoj:
    - el la araba: *aval* („antaŭe”), *emer* („vivo”), *vahat* („tempo”), *masar* („tombejo”), *salam* („saluton”), *ten* („religio”), *ĵalaf* („popolo”) k.a.;
    - el la persa: *asta* („metiisto, majstro”), *erne* („semajno”), *patŝa* („reĝo”), *paĵa* („ĝardeno”), *taŝman* („malamiko”), *tus* („amiko”) k.a.;
    - el la mongola: *pil* („mielo”), *pattar* („heroo”), *puĵan* („riĉa”), *ĉul* („ŝtono”) k.a.;
    - el la finno-ugraj lingvoj (marea kaj udmurta): *kaj* („foriri”), *pjurtj* („domo”), *sahal* („malmulte”), *pukan* („seĝo”) k.a.;
    - tre granda grupo de rusaj pruntaĵoj: *kuŝak* („kato”), *apat*

(„manĝo”), *kampa* („fungo”), *tujtar* („kuracisto, doktoro”), *ŝkul* („lernejo”), *karap* („ŝipo”), *ŝjemje* („familio”), *puŝar* („brulego”), *lavkka* („vendejo”), *kaŝni* („ĉiu”), *kuĉeneŝj* („donaco”) k.a..

Certe, la lasta grupo estas la plej granda, ĉar preskaŭ ĉiuj ĉuvaŝoj posedas la rusan kiel la duan gepatran lingvon. Ĉe tio en sia parolo la ĉuvaŝoj ofte uzas diversajn rusajn vortojn. La nombro de tiuj pruntaĵoj ĉiam kreskas.

La supre donita listo de lingvoj ne estas kompleta. Ekzistas tre multaj hipotezoj, laŭ kiuj la ĉuvaŝa pruntis vortojn el pluraj aliaj; oni nomas eĉ lingvojn de ŝumeroj kaj amerikaj indianoj.

Nuntempe, kiel en la tuta mondo multe influas la ĉuvaŝan vortaron terminoj de la angla: *kompjuter* („komputilo”), *menedĵment* („administrado”), *prodĵuser* („enscenigisto”) k.a..

## Literaturo

La skriba verkado ne havas longan tradicion, kvankam iuj ĉuvaŝaj verkistoj jam atingis rekonon ne nur inter rusiaj, sed ankaŭ inter eksterlandaj kolegoj. La plej famaj ĉuvaŝaj verkistoj estas: Konstantin Ivanov (kun senmorta poemo *Narspi*), Miŝŝi Sespel, Peter Ĝusankaj, Fjodor Ujar, Nikifor Mranjka, Miŝŝi Juĵma, Gennadij Ajgi, Jeva Lisina. Kontraste al relative juna skriba verkado (kvankam iuj ĉuvaŝaj esploristoj asertas ke antaŭe ekzistis ĉuvaŝlingvaj verkoj surbaze de la araba alfabeto kaj eĉ la runa), inter ĉuvaŝoj de antikva tempo estis disvastigita la buŝa popola verkado, ĉefe en formo de kantoj. Ne hazarde Ĉuvaŝujon oni nomas la lando de cent mil kantoj.

Aleksandr BLINOV/Eduard LEBEDEV

## Referencoj

La plimulto de la sciencaj verkoj pri la ĉuvaŝa estis farita ruslingve. Oni povas nomi tiujn de Nikolaj Aŝmarin, Vasilij Jegorov, Miĥail Fedotov, Ivan Pavlov (ĉuvaŝlingve), Ivan Andrejev, Nikolaj Jegorov. Tiuj, kiuj ne posedas la rusan, legu la verkojn de J. Benzing („Das Tschuwaschische” en *Philologiae turcicae fundamenta*, Wiesbaden, 1959) kaj J. R. Krueger (*Chuvash manual: Introduction, Grammar, Reader and Vocabulary*, Bloomington: Indiana University, 1961). Aliaj verkistoj pri la temo estas M. Räsänen, G. Ramstedt, H. Paasonen, kaj J. Budenz.



## POLLANDO

# Pieniny-montaro

Pieniny [pienini] estas montaro, situanta en Sud-Pollando. Ĝi estas parto de Karpatoj kaj konsistas el 30-kilometra zono de kalkkroketoj.



**P**ieniny-montaro konsistas el nealtaj, nestformaj montoj, kiuj estas dividitaj de la rivero Dunajec en tri partojn: *Pieniny Spiskie* kun pinto *Żar [jar]* (879 m), *Pieniny Właściwe* [vũaŝcive], inter *Czorsztyn [ĉorŝtin]* kaj *Szczawnica [ŝĉavnica]*, kun pinto *Trzy Korony* (982 m), kaj *Pieniny Male* kun pinto *Wysoka [visoka]* (1052 m).

*Pieniny Właściwe* estas la plej bela kaj plej alloga montarparto. Ĝi longas nur 12 km kaj larĝas 4-5 km. Ĝian centron okupas la masivo *Trzy Korony [tři koroni]*, kiun la valo *Pieninski Potok* apartigas el la *Pieninki-montareto* kun la alloga pinto *Sokolica* (747 m). Ĉi tie estiĝis eksterordinara kaj komplika strukturo geologia. La montoj estas elformitaj ĉefe el kalkaj kaj malpli el sablaj rokoj. La malmolaj pintoj de *Pieniny* (*Trzy Korony*, *Sokolica*) estiĝis

el kalkŝtonoj. En la zono de keratozaj kalkŝtonoj estas eltranĉita la plej valora naturbelajo de la *Pieniny*-regiono – la breĉo de la rivero *Dunajec*.

## Nacia Naturparko „Pieniny”

Sur la negranda areo de la *Pieniny*-montaro ekzistas riĉega faŭno. Ĝis nun oni registris 6500 bestospeciojn, sed supozas, ke ĉi tie vivas 13 000 - 15 000 el entute 30 000 konataj bestospecioj sur la teritorio de Pollando. La flaŭro ampleksas ĉirkaŭ 1100 vegetaĵ-speciojn. Tio estas duono de la specioj registritaj en Pollando. Inter ili estas eĉ iuj, kiuj kreskas nur ĉi-loke. Allogaĵo de la *Pieniny*-montaro estas ankaŭ ĝia situo ĉe la limo de Pollando kun Slovakio.



En tiu regiono homo aperis jam en la periodo de paleolitiko (setlejo *Kały*

*Tipaj boatoj sur Dunajec.*

[konti]), kaj mastrumado de homoj komenciĝis ĉi tie ĉirkaŭ la dua duono de 13a jarcento. Tiutempe oni estigis la unuajn setlejojn kaj konstruis fortikaĵojn.

En *Pieniny*-montaro la loĝado de homoj kaj ilia mastrumado ne kaŭzis damaĝojn al la naturmedio, sed kontribuis por ĝia variigo. Paŝtado de bovoj kaj agrikulturo kaŭzis la aperon de harmonia konglomerato el arbaroj, rokoj kaj paŝtejoj – eksterordinara pejzaĝo de la *Pieniny*-montaro. Ĝi konsistas el





*Pino sur la montopinto Sokolica (sube) kaj la rivero Dunajec (supre).*

12 ekologiaj kaj 9 ekologiaj sistemoj substituj. La plej vidindaj el ili estas platanaceraj arbaroj, pinaj arbaretoj kaj surrokaj montarherbejoj.

Jam en la 19a jarcento oni rimarkis unikajn estetikajn valoraĵojn kaj esplorindajn specifaĵojn en la Pieniny-montaro. Danke al klopodoj de sciencistoj kaj turistoj en 1932 estis fondita Nacia Naturparko „Pieniny” – la unua tiuspeca parko en Eŭropo.

La Nacian Parkon „Pieniny” oni povus viziti piede, per aŭto aŭ trarigardi,

navigante per boato laŭ la fluo de la rivero Dunajec. La vizitantoj ekkonas plej sovaĝajn lokojn, kaj ankaŭ kulturon, historion kaj legendojn de la Pieniny-regiono. La boatnavigado havas jam pli ol 160-jaran tradicion kaj nuntempe ĝi estas organizata de Pola Asocio de Pieniny-Flosistoj, kiu ekestis komence de 1934. En ĝi nun membras 500 personoj. Iniciatinto de la boatado estas Józef Szalay (juzef ŝalaj), posedanto de kuracejo en Szczawnica, kiu en la jaroj 1830-1840

atribuis al la boatnavigado laŭ Dunajec-rivero solenan kaj patriotisman karakteron.

## Navigado laŭ rivero Dunajec

La navigado efektiviĝas per boatoj, konsistantaj el kvin lignaj kunigitaj kanotoj – nomataj „cołna” [coŭna], kiuj estas 5,75 m longaj kaj 0,45 m larĝaj. Ilin direktas du personoj. Antaŭe la kanotoj estis faritaj el arbotrunkoj, sed nun ili konsistas el kunnajlitaj lignotabuloj. En boato povas veturi 10 personoj.

La boatado malsupren laŭ la fluo de la rivero Dunajec komenciĝas en Sromowce-Kały [sromovce-konti] (466 m), en haveno, kie estas memoraĵvendejoj, restoracio, ekspoziciejo kaj informejo. En la ekspoziciejo eblas ekvidi unikajn boatojn, faritajn el trunkoj.

La plej bela sektoro por navigado laŭ la rivero Dunajec komenciĝas ĉe montodomo Ostra Skala (akra roko), sub loko Sromowce Niżne [sromovce niĵne]. Ekde ĉi tie, en distanco de 2,5 km en rekta linio, la rivero Dunajec estigas en sep grandaj kurboj 8-kilometran akvovojon laŭ 35-metra deklivo. La valo mallarĝiĝas kelkloke ĝis 50 m, kaj la rokmuroj tie altas 300 m.

La riverdeklivo ne estas regula – alternas rapidegaj sektoroj kaj trankvilaj lokoj. La riverfundo estas kovrita per kalkaj kaj sablaj ŝtonoj. La rivero disponigas bonajn vivkondiĉojn por multaj fiŝspecioj, el kiuj plej grandkvantaj estas: barbofiŝo, timalo, truto kaj *huko*. La tuta areo de la Dunajec-breĉo estas mediprotektata. Arbaraj sistemoj ekologiaj konservis la naturmedion.

Apud monto Sokolica, vidindas pinarbaretoj kaj surrokaj herbejoj. En ili oni povus ekvidi ĝis 150 plantospeciojn. Dum la boatnavigado, la direktistoj sciigas pri la distanco, pri la Pieniny-regiono, pri arbaroj kaj montaraj legendoj.

Elirinte el la kanotboato en la finhaveno Szczawnica, la veturintoj povas kontenti, ke ili trarigardis nur parton de Pieniny-montaro – la Nacian Parkon. Ĉi tie indas resti almenaŭ kelkajn tagojn, por pli bone ekkoni la regionajn kulturon kaj historion, viziti naturbelaĵojn, kurac- kaj ripozlokojn, situantajn en Pieniny-regiono.

Estas eldonitaj koloraj prospektoj por turistoj en la angla, franca kaj germana lingvoj. Esperantistoj, vizitontaj la Pieniny-montaron, petu eldonon de prospekto en la Internacia Lingvo ĉe: Biuro Słowiwo, PL-34-443 Sromowce Wyzne-Kały; tel.: (0-187) 50221.

Stanisław ŚMIGIELSKI



# Neatenditaj epidemiigoj pro tekniko




La antikva homo ricevis nur malmultajn infektajn malsanojn senpere de siaj antaŭuloj, la simioj. Eĉ nuntempe ekzistas nur kelkaj malsanoj (simia variolo, flava febro de ĝangaloj, apartaj hemoragiaj febroj, iuj helmintozoj, ktp), kiujn la homo povas ricevi de simioj. Por la plejparto de la infektaj hommalsanoj la fontoj de la infektado estas infektitaj homoj kaj diversaj (precipe hejmaj) bestoj.

**D**um la evoluo la kvanto kaj vario de la homaj malsanoj kreskis pro la socia aktiveco. Ĉasado kaj bestbredado kondukis al la apero de tiaj malsanoj kiel brucelozo, antrakso, salmonelozo, pesto, ktp. Nur en la malfrua stadio de la homara evoluo, kiam aperis urbetoj, aperis la aergute infektaj malsanoj (morbito, kokluŝo, difterio, gripo, variolo, varicelo, ktp), ĉar por la transmisio de tiuj malsanoj necesas ekzistado de grandaj kolektivoj, longdaŭra estado en loĝejoj, apero de la parolkapablo. La multaj infektaj malsanoj komencis disvastiĝi el la endemiaj regionoj tuj post la apero de pli rapidaj transportaj rimedoj.

En la 19a jarcento, ekzemple, rezulte de la invento de la vaporŝipo kaj lokomotivo, estis enportitaj en Eŭropon, el endemiaj regionoj de Azio, multnombraj kazoj de ĥolero. Aviado pli akcelis la propagadon de multaj infektaj malsanoj. La militoj provokis amasajn epidemiojn. Sufiĉas nur unu ekzemplo: dum la jaroj de la unua mondmilito malsaniĝis je gripo en la mondo ĉirkaŭ 500 milionoj da homoj, el kiuj 20 milionoj mortis.

Eĉ la malkovro de mikroboj ne povis rezultigi ĉeson de multaj epidemioj. Ofte la nesufiĉe pripensita uzo de la

novaj medicinaj teknologioj provokis epidemiajn malsanojn. Tiel – post la malkovro de la sangogrupoj – la vasta kaj senkontrola uzado de la transfuzado de sango, sangodevenaj preparaĵoj kaj malbone steriligitaj injektiloj kondukis al la epidemia disvastiĝo de la virusaj hepatitoj B kaj C. La samaj medicinaj manipuladoj akcelis la disvastiĝon de aids (kune kun prostituo, narkotismo). Eĉ post la malkovro de la virusoj de aids, la infektitaj sangodevenaj preparaĵoj malsanigis multajn hemofiliajn malsanulojn. Nuntempe pro senkontrola aplik-



Dum la unua mondmilito 20 milionoj mortis pro gripo.

ado de antibiotikoj, nesufiĉa higiena reĝimo tre disvastigis la mikrobojn rezistajn kontraŭ multaj medikamentoj. La nesufiĉa steriligado, malbona izolado kaj neplenumo de la higienopostuloj kontribuis al disvastigo en multaj afrikaj regionoj de la tre danĝeraj hemoragiaj malsanoj Lasa, Marburg, Ebola.

Nepripensita enigo de novaj teknologioj povas kaŭzi disvastiĝon de malmulte konataj kaj nekonataj infektaj malsanoj. Jen du ekzemploj:


Multaj aŭdis pri tiel nomata *bova frenezo* (bova spongeca encefalopatio), disvastiĝinta en Britio kaj en iuj aliaj landoj, kiu kaŭzis grandan panikon pro malsanigo de homoj je Creutzfeldt-Jakob-malsano, rezulte de manĝado de infektita bovaĵo. La malsano estis kaŭzita de animala (ostodevena) faruno kaj viando-restaĵoj, infektitaj per prionoj (ŝanĝitaj proteinaj partikloj, kapablaj kaŭzi malsanojn) kaj malprudente fabrikitaj kaj donitaj kiel manĝaĵo al la brutaro.

La dua ekzemplo: La vasta uzado de klimatiziloj, akvo-disŝpruciloj kaj aliaj aero-malsekigiloj, infektitaj per Legionelo-bakterioj, kondukis al epidemio de la grava pulmomalsono legionelozo (malsano de legianoj). En



la menciitaj ekzemploj ĉiuj ĉi-sekvaj profilaktikaj rimedoj estis aplikataj kun granda malfruo.

Nuntempe, kiam la diversaj teknologioj evoluas seninterrompe, oni devas antaŭe pripensi pri iliaj eble danĝeraj konsekvencoj kaj ties prevento. Ekzemple, nun ĉiujare pliintensiĝas la esploroj pri transgenaj organismoj, kiam en la genaron (genomon) de iu biologia specio oni enmetas genojn de alia specio, cele al plia produktiveco, rezisteco al parazitoj, ktp. Eĉ realiĝas esploroj, kiam genaron de porkoj oni enmetas en homajn genojn por ricevi organojn ne provokantajn imunreagon post sia transplantado. Tamen, oni devas ne forgesi, ke en transgenaj organismoj povas okazi reduktiĝo de la defendkapablo de la specifeca imunostato kontraŭ iuj parazitoj. Krome, es-



Militoj provokos amasajn epidemiojn

## Ĉu la infana paralizo malaperos?

Oni komencis la finajn preparojn por la definitiva neniigo de poliomjelito (infana paralizo). Laŭ planoj de Unuiĝintaj Nacioj ĝis la fino de 2000 tiu malsano, kiu ĝis la 60aj jaroj de la 20a jarcento kripligis milionojn da infanoj en la mondo, estos forpuŝita. La Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) kaj la Organizaĵo de UN pri Helpe al Infanoj (UNICEF) alvokis ŝtatestrojn de 30 landoj, en kiuj poliomjelito plu ekzistas, al lasta batalo kontraŭ tiu „skurĝo” de la homaro.



Harlem Brundtland.

„Ni staras ĉe la sojlo de historia venko: la neniigo de poliomjelito”, deklaris al politikistoj la ĉefoj de la du organizaĵoj, s-inoj Gro Harlem Brundtland kaj Carol Bellamy. Ĉu la celo estos atingita, dependas de persona engaĝo. Ambaŭ alvokis la ŝtatestrojn informi detale la publikon kaj zorgi pri tio, ke ĉiuj neprotektitaj infanoj en la koncerna lando estu vakcinitaj.

Unu el la ĉefaj sponsoroj de la tutmondaj vakcinkampanjoj estas la internacia Rotario-klubo. Krom la ampleksaj mondonacoj, nur en Hindio ĝi mobilizis 150 000 volontulojn, kiuj agadas enkadre de la naciaj vakcintagoj.


La Monda Organizaĵo pri Sano deklaris en siaj planoj jam en 1988, ke la forigo de poliomjelito estu efektiva ĝis la fino de la jaro 2000. Ekde tiam la nombro de malsanuloj tutmonde malpliigis de 350 000 al nur 5200 en 1999. 70 procentoj de tiu nombro malsaniĝis en Hindio. En Eŭropo, en norda, meza kaj suda Ameriko, en okcidenta Pacifiko, en proksima Oriento samkiel en norda kaj suda Afriko oni jam malaperigis tiun malsanon. La kompleta forigo de tiu malsano ŝparos jare 1,5 miliardojn da usonaj dolaroj pro vakcinaj, kuracaj kaj aliaj kostoj.

Poliomjelito estas infekta malsano, kiun kaŭzas viruso. Ĝi detruas la nervoĉelojn, kiuj aktivigas la muskolojn, kaj estigas neresanigeblajn paralizojn. Pli ol la duono de la viktimoj ricevis la malsanon antaŭ la aĝo de tri jaroj.

Evgeni GEORGIEV

tas konate, ke aliaj specioj povas infektiĝi per nekonataj danĝeraj virusoj, tial la esploroj devas realiĝi en absolute sterilaj kondiĉoj.

Ankaŭ necesas memori, ke en la ĉeloj de porkoj jam multfoje en nia jarcento kombiniĝis la danĝeraj por la homo virusoj de gripo, kiuj kaŭzis vastajn epidemiojn. En la transgenaj or-



MOS volas intensigi la internacian kontroladon.

ganismoj procesoj similaj povas akceliĝi.


Por preventi novajn epidemiojn la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) akceptis decidon intensigi la internacian kontraŭepidemian kontroladon. Por tio, tamen, ne sufiĉas la penadoj de medicinistoj. Necesas la aktiva partoprenado de sociologoj, ŝtataj agantoj, alifakaj sciencistoj, ĵurnalistoj, kaj aliaj.

Kiel iam diris la elstara roma filozofo Seneko: „La estonteco ankoraŭ forestas, sed antaŭvidi ĝin en pli aŭ malpli alta grado ni estas devigataj.”

Vladimir LEMELEV



# Unuafoje en Esperantujo



Paĝoj: 106; ilustrita;  
21 cm; kudre bindita;

Prezo: 18,00 €

## Plena monografio pri moderna astronomio

La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo, akorde kun sia subtitolo (elementa kurso pri astronomio), konsistigas veran manlibron pri teoria kaj praktika astronomio. Skribita de du profesiaj astronomoj (David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel), ĉi tiu konciza verko prezentas tre aktualan bildon pri nuntempa astronomio en lingvaĵo kaj stilo facile komprenebla de ne-fakuloj. Verko blank-nigre ilustrita per desegnaĵoj kaj bildoj, kiuj akompanas kaj klarigas la tekston.

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

<http://retbutiko.esperanto.be>


## OESTROGENO

### Akcelilo de cerbokreskado

**F**emala seksa hormono havas evidentan efikon akceli kombinadon de cerbotubeta proteino en maturaĝa rato. Tiu efiko okazas post la kriza tempo de cerbokreskado, kiam tiroida hormono perdas la efikon akceli la sintezon de cerbotubeta proteino. Tiu ĉi proteino estas ĉefa konsistaĵo de la tubetoj en neŭronaj dendritoj kaj aksonoj.

Neŭrono estas speciala unuo de la nerva sistemo, konsistanta el nerva ĉelo, el protoplasma branĉetaro (dendritoj) kaj el la neŭrona fibro (aksono). Manko de la menciita proteino kaŭzas ŝanĝon de cerbaj strukturo kaj funkcio, ekzemple la cerbokreskan difekton en kretenismo.

Guo Shouxiang [kuo ŝouŝjiang], profesoro de la Medicina Universitato de



*Oestrogeno povas protekti cerbajn strukturon kaj funkcion.*

Tianjin [tjanĝin] en Ĉinio, kun sia grupo esploris kaj pruvis tion per eksperimento. Guo kaj aliaj trovis evidentan diferencan kvanton de cerbotubeta proteino inter femala kaj maskla musoj, sed nur post seksa maturiĝo kaj antaŭ kadukiĝo. Oni ankaŭ trovis, ke oestrogeno havas gravan efikon akceli kombinadon de la proteino, kaj tiu ĉi efiko estas la sama en la du seksoj.

Prof. Guo opinias, ke oestrogeno povas anstataŭi tiroidan hormonon por akceli kombinadon de cerbotubeta proteino, kiam la tiroida hormono perdis sian kuracan efikon, tio estas, oestrogeno eble efikas en preventado kaj kuracado de kretenismo kaj cerbokreska difekto. Samtempe, oni povas protekti cerbajn strukturon kaj funkcion en mezaĝuloj kaj maljunuloj por prokrasti kadukiĝon.

PENG Juanjun



# Respondas la GPS-satelitaro

Antaŭ kelkaj jaroj, por determini la horizontalan kaj vertikalan geografian situon de si mem kaj direkton kaj distancon de forlasita aŭ celata sekva stacio de veturo, oni bezonis uzi delikatajn instrumentojn (surmare ekz. sekstanton, kronometron, kompason; surtere teodoliton kaj videblajn surterajn aŭ surĉielajn fikspunktojn, barometron, mapojn, tabelojn, kalkulilojn) kaj fari komplikajn kalkulojn.

Tamen, post la ekfunkciado de la tiel nomata GPS, t.e. *Global Positioning System* (= tergloba pozici-determina sistemo), tiuj kaj aliaj komplikaj kaj temporabaj instrumentoj kaj metodoj fariĝis superflujaj.

La fakta uzo de GPS komenciĝis en 1978 kiam la Ministrejo pri Defendado de Usono lanĉis orbiten la unuan sateliton de la tiel nomata *artkonstelacio NAVSTAR*, kiu dekomence havis celojn ĉefe militajn, sed poste ankaŭ civilajn. Nun, tiu ĉi artkonstelacio konsistas el 24 satelitoj pasantaj laŭ diversaj cirklaĵoj orbitoj, proksimume 22 200 km alte super la marnivelo.

Tiuj artsatelitoj radias al la Tero ultrakurtajn ondojn, havantajn informojn, kiujn GPS-riceviloj povas konverti en surekrane aperigeblan kaj legeblan formon. La informoj estas, precipe kaj interalie, la tri geografiaj koordinatoj, la


movdirekto kaj -rapido, ktp, de la ricevilo. Nun, GPS-riceviloj uzataj de ekskursemuloj grandas proksimume kiel cigaredujo, pezas kiel poŝlampo kaj kostas nur kiel bona poŝkompaso.

Antaŭ jaro la lokdetermina precizeco (averaĝe 10 metroj) de tiaj GPS-riceviloj estis kontentiga por preskaŭ ĉiuj uzantoj, kvankam tiu malgranda eraro estis enmetita de la usona Defendadministrejo mem, por malfaciligi la utiligon fare de aliaj armeoj. Ekde la 1a de majo 2000 tamen tiu erarigado estas ĉesigita – diversmaniere la uzantoj ja lernis kiel korekti la erarojn.

Grava avantaĝo de la GPS-riceviloj estas ankaŭ, ke ilia uzo estas tre simpla, multe pli simpla ol tiu de sekstanto kaj eĉ kompaso. Oni povus diri ke sufiĉas kompreni la koordinat-sistemojn polusan kaj kartezian por povi uzi la ricevilon perfekte. Krome,

la GPS-riceviloj kostas pli kaj pli malmulte kaj fariĝas pli kaj pli multflankaj, s a m t e m p e malkomplikaj, malgrandaj kaj malpezaj, do oni rajtas prognozi ke tre baldaŭ ili anstataŭos ĉiujn aliajn instrumentojn por orientado kaj topografio.

Luiso GILPEREZ



La artkonstelacio de la GPS-satelitoj.

|               |              |      |
|---------------|--------------|------|
| 345           | N            | 015  |
| TRACK<br>000° | SPEED<br>0.0 | km/h |
| TRIP<br>0.0   | ALT<br>12    | m    |
| POSITION      |              |      |
| 30 S 0237155  |              |      |
| UTM 4142203   |              |      |
| TIME          |              |      |
| 18:30:23      |              |      |

La ekrano de senmova

GPS-ricevilo:  
ALT 12 Mt =  
12m super la marnivelo.

30S = nomo de unu el la 1200 GPS-zonoj de la Tero. La du grandaj nombroj

estas x- kaj y-koordinatoj de la ricevilo en metroj, ene de la zono 30S.

TIME = momenta tempo en horoj; minutoj; sekundoj.



La ekrano de portebla GPS-ricevilo:

P3 = nomo de la punkto atingenda.  
123° = momenta direkto al P3 rilate al nordo.


2,73 km = momenta distanco ĝis P3.

N = direkto de nordo rilate al la momenta akso de la ricevilo.

Sageto = momenta direkto al P3 rilate al la momenta direkto de la ricevilo.

130° = direkto de la akso de la ricevilo rilate al nordo.


4,1 kh = momenta rapido de la ricevilo: 4,1 km/h. La punkto sur la suba skalo montras la devion de la akso de la ricevilo disde nordo (130° - 123° = 7°).



La ekrano de la GPS-ricevilo, montranta la vojon de la GPS-ricevilo:  
10 km = skalo (distanco inter la du randoj de la ekrano).

137° = direkto de P3 al P4 rilate al nordo.

2,94 = distanco inter P3 kaj P4 en kilometroj.



Konstruado de la GPS-satelito.



VENEZUELO

# Serpentoj

**Dekomence mi ŝatus konfesi, ke mi ne estas kaj ne estos hobiano de serpentoj. Tamen mi respektas ilin samkiel principe ĉiujn vivestaĵojn. Do, ĉi tie mi rakontos pri la hobio de unu el miaj konatoj, kiun mi dum multaj jaroj ne renkontis, kaj ankaŭ pri personaj spertoj dum mia restado en Venezuelo.**

**L**a menciita konato (pro certaj kialoj mi ne preferas nomi lin amiko) foje invitis min partopreni ekskurson por kapti serpenton, kiu science estas konata sub la nomo *Bothrops medusa*. Tiun kaj serpentojn de aliaj specioj li tenis en profunda, senakva puto kun alta cementa parieto. La rampulojn de la specio *Bothrops medusa* li igis mordi spongon. Poste li elpremis la spongon, konservis la akiritan venenon en fridujo kaj vendis ĝin al farmacia entrepreno. Tie, laŭ lia informo, oni produktis el la liverita veneno medikamenton kontraŭ doloroj de malsanuloj, suferantaj je cerebra kancero.

Do, el Karakaso ni suprenveturis telfere la monton Avila, kiu, kronite de luksa hotelo, situas inter la venezuela ĉefurbo kaj la maro. De sur la pinto ni malsupreniris laŭ vojeto tra arbaro, kie mia konato kutimis trovi la valorajn reptiliojn. Vere, post iom da tempo en senarbejo ni ekvidis serpenton, kuŝantan kaj sin sunumantan sur falinta trunko. Mia kuniranto donis al mi la dorsosakon, entenantan la kaĝon por serpentoj. Poste li preparis zorge la stangeton kun maŝkaptilo, per kiu li kaptis rampulojn. Malsuprenirante la deklivon por atingi la kuŝantan en la suno beston, mia konato subite ekglitis kaj renversiĝis direkte al la venena serpento. Danke al lia kriego la rampulo teruriĝis pli ol li mem kaj bonŝance forglitis en la arbaron anstataŭ mordi la atakanton.

Tio estis nia sola kaj bedaŭrinde perdita ŝanco. Por konsoli min pri nia fiasko, hejme li montris al mi la puton de serpentoj, kies venenon li vendis. Antaŭ nelonge, laŭ lia rakonto, najbaro laŭtvoĉe petis helpon pro rompoŝtelisto. Kune kun aliaj najbaroj mia konato serĉis la fuĝintan rompo-

ŝteliston. Post iom da tempo ili subite aŭdis teruran kriegon. La persekutato estis sin kaŝinta en la serpenta puto, el kiu li nun eskapis. Verŝajne li baldaŭ poste mortis pro venena mordo, ne atentinte la avertojn de siaj persekutantoj.

Alian sperton pri tiaj reptilioj mi ekhavis proksime al urbeto Barinas. Veturante laŭ ŝoseo, ni vidis subite, ke la antaŭe veturanta aŭto haltas, kaj la homoj eliras el ĝi. Ili rigardis grandan serpenton *tragavenado* (*Constrictor constrictor*), kies kapon la veturilo estis frakasinta. Leporo, antaŭe englutita kaj nun elvomita, kuŝis flanke de la ĵus mortigita serpentego. Dum ni parolis kun la veturantoj el la aŭto, alveturis tria aŭto. Ties ŝoforo estis tre praktika viro. Dirinte tre lakone: „La haŭto taŭ-

gas por bona mansako”, li senhezite ĵetis la serpenton en la pakaĵojn de sia aŭto kaj forveturis.

Du- aŭ trioble pli granda ol tiu *tragavenado* estas *anakondo* (*Eunectes murinus*). Ĝi povas esti longa pli ol ok metrojn. Oni rakontis al mi, ke tiu specio de serpentoj estas tre oftaj en la Orinoko-delta. Sed mi neniam vidis ĝin tie dum miaj vojaĝoj. Anakondo kutimas atendi pacience siajn viktimojn en marĉaj lagetoj aŭ flakoj. Poste ĝi enigis siajn dentojn en la muzelon de bestoj, kiuj alproksimiĝas por trinki, trenas ilin en la akvon kaj, ĉirkaŭvolvante ilin, rompas iliajn ostojn por poste englutegi la viktimojn. Oni rakontis al mi, ke tiumaniere estis voritaj eĉ infanoj.

Werner SCHAD




Monto Avila.

La mortigita serpento sur la ŝoseo proksime al Barinas.



de PEJNO Simono



# La profeta kurso

(Parto 1)

**Z**andero vivis en Svisujo, kie li posedis tre imponan multĉambran domon. Ĝi situis sur kruteta deklivo supervide de vilaĝo ĉe la sudpinta bordo de Lago Lemana. Rekte kontraŭe trans la klara akvo videbligis la fama konferenca urbo Ĝenevo. Ĉirkaŭ Zandero loĝis nur finance tre bonstataj homoj - entreprenistoj, borsistoj, finanĉkonsilistoj, bankistoj. Interalie famaj aktoroj el la filma mondo najbaris.

Nur cent metrojn de lia naĝbaseno limis la grundo de Petro Ustinovo kaj ne treege fore iam loĝis la intertempe mortinta Karlĉjo Ĉaplino. Zandero okupiĝis tamen nek pri financo, nek pri filmo. Li estis trejnisto de religiuloj pri direktoriko laŭ bibliaj principoj. Aldone al lia paletro apartenis la instruado pri superpova preĝado, mirakla sanigo kaj profetado. Kontraŭ po 2000 eŭroj por ĉiu kursano plus ĉiuj vojaĝkostoj li pretis flugi ien mondvaste por trejni junajn fervorulojn pri tiuj aferoj kaj verdire lia kalendaro estis sufiĉe rendevuŝtopita. Sola kondiĉo por lia vizito estis plensuma antaŭpago, mendita gastigo en minimume tristela hotelo kaj klaso kun almenaŭ kvin kursanoj. La kurso mem daŭris tutan semajnon, de lundo ĝis vendredo, kaj regis granda postulemo pri liaj kursoj - kaj en Usono, kaj en la industriŝtatoj de Eŭropo. Nu, eble Zandero ne estis la plej kostoŝpara trejnisto de homoj ambiciaj pri profetiĝo kaj efektive li sufiĉe publike transformis profetojn en profitojn. Sed ekde kiam li estis sukcesinta lanĉi sian libron pri Kristana entreprenestrado en pluraj Evangelikaj libroservoj, lia allogo en tiuj rondoj estis konsiderinde kreskinta.

Vere sensacie estis tamen, ke ekde ĉirkaŭ jaro liaj kursoj enhavis elementon, kiu ĉie mankegis en la kursoj de liaj konkurencantoj. Nur Zandero regule pruvis al la kursanoj, unue ke superpova preĝado bone kaj tuj funkcias, kaj, due ke mirakla sanigo estas ne nur por li ebla, sed ankaŭ por ĉiuj liaj kursanoj, kondiĉe ke ili sufiĉe klopodu pri tio. Jen tre instiga kaj vere grandioza sukceso por liaj lernantoj pri tiuj misterplenaj fakoj. Nur pri la profetaĵoj li ankoraŭ ne povis liveri vere konvinkan pruvon. Sed tio ne tre ĝenis, ĉar Zandero, sportista, iomete magra, ĉiam neformale tamen tre altkvalite kaj laŭmode vestita brunbarba kvardekjaraĝulo - aspekta mikso inter konsilisto pri geedzaj problemoj kaj banka direktisto - ĉiam zorgis pri tio, ke liaj profetaĵoj celu sufiĉe estonten kaj pro tio ne estos tre baldaŭ kontroleblaj. Intertempe ĉiuj

predikistoj, misiistoj kaj kvestistoj en la Evangelika movado bone konis lian nomon.

Malpli bone oni konis liajn kurse elmontritajn pruvojn. Aliflanke, ne estis iu dubo pri tiuj, ĉar ĉiuj ekskursanoj ĵuris je mil biblioj, ke iliaj lernitaĵoj dum la kurso tuj kaj ege videble funkciis. Tamen oni ne rajtis paroli pri tio, ĉar Zandero devigis ĉiujn silenti pri siaj valoraj sekretoj. Laŭ liaj sufiĉe urĝe voĉitaj vortoj estis tiel, ke se iu malsekretos pri la vere frapa kursa rezulto - nome la praktika apliko de superpova preĝado kun demonstracio de mirakla sanigo, ĉio fare de la kursanoj mem - tiu perfidulo perdos siajn de li instruitajn novajn povojn. Do pro tio oni ne babilu pri tiuj ĉi sanktaĵoj. Evidente, perdi siajn povojn neniu volis - ne lastmotive pro la prezo akiri ilin. Sekve Zandero estis tre sukceshava komercisto kaj pro tio povis laŭe lukse rezidi sur la bordo de Svisa lago.

Kiel ofte, li atente aŭskultis ĉetelefone, notblokon enmane:

„Ankaŭ fratino Sandra estas, kiel ĉiuj aliuloj, ankorau ne tridekjaraga. Jen ja juna skipo. Nu, ŝi sukcesis prokrasti sian ferian skiadon, tiel ke ŝi povos partopreni. Sciuj, ne fore de tie ĉi, estas ĉi-vintre bona skiado.”

„Bone, frato Frederiko. Kiel vi diris, aldonigu nun unu kursano - fratino Sandra, la dua datumklavistino ĉe vi. Do mi ripetu la liston. Do jen frato Bodo, la transportestro, fratino Helena, la alia klavistino, fratino Ingrida, via sekretariino, frato Karlo, la komputilestro, frato Miĉjo, el Rusujo, via filino Karolina, plus la tri personoj el la ĥoro, el kiuj unu devos malĉeesti lunde. Kaj memkompreneble vi mem, estimata frato Frederiko. Do jen dek personoj. Nu, mi donos al vi rabaton: vi pagu nur por naŭ personoj, jen 18000 eŭroj. Tiujn mi petas spezi al la konto piede de mia anoncilo.”

Ĉe la alia fino de la lineo parolis tre ŝika kvindekjarulo en blanka kompleto - iomete laŭ la modo de la freneza sekto de specifa fratino Gabriela, kiu ĵus staris antaŭ tre ĉi-monda juĝistaro, akuzita pri fraŭdo de la impostejo pro ne deklaritaj vendoj de sankta sanigpova akvo - fakte rekte el ŝia akvokrano. Sed ŝian akvon la tre pia katolike edukita prokuroro el Bavarujo tute ne kritikis. Li celis nur alporti al la ŝtata kaso la impostojn kalkulitajn baze de la vendoj de la senefika akvo. Tre feliĉe fratino Gabriela fare de spontane spertita Dia rivelado - ŝi estis ja laŭ propra eldiro „la voĉo de Jezuo Kristo” - estis instruita anonci sin kulpa, pro kio ŝia ĉi-monda monpuno eble malgrandiĝu. ▶



► Same blankvesta Frederiko Tureko, eksa vendisto de asekuroj, estis nun la misiestro kaj ĉefo de unu el la multaj kvestejoj en Germanujo. Li estis lerninta sian novan fakon en mondvaste tre konata Usona misiejo, kiu jam prikvestis gigantajn monsumojn en Eŭropo. En tiu organizaĵo frato Frederiko sukcesis tre krute karierumi kaj dum nur du jaroj progresis ĝis la posteno de sekciestro por la Germanlingvaj landoj. Iun matenon Dio rivelis al li, ke li nepre ŝtelu ĉiujn adresojn de la donacantoj el la komputila centrejo. Tiun Dian ordonon li malfruvespere, kiam li estis tute sola en la misiejo kaj kun adekvata preteksto por tio, ke oni ne jam malŝaltu la komputilojn, sekrete realigis. Poste li tuj maldungigis sin kaj fondis propran misiejon. Post tri jaroj, danke al la kunportitaj 50 000 adresoj de la plej naivaj donacemuloj de la tuta respubliko, li antaŭjare, do nur tri jarojn post lia sendependiĝo, enkvestis 4 milionojn da eŭroj - laŭreklame por aĉeti bibliojn en tiam ankoraŭ ekzistanta komunisma Sovetio. Ĉiuokaze, nun, konscie pri la fakto, ke nur 800 biblioj reale liveriĝis en la Regnon de Malbono, li fronte al la vortoj de frato Gido - jen la disĉipla nomo de s-ro Zandero - komencis dubi. Li iel maltrankviliĝis pro la proponita rabato, ĉar li timeme demandis:

„Sed la superpova preĝado vere centelcente funkcios kaj ankaŭ la demonstracio pri sanigo, ĉu? Vi garantiu pri tio, kaj, ke ni ja ricevu la kompletan kurson!”

„Jes, jes. Temas pri mia plena kurso, per kiu mi kondukas ĉiun kredantan infanon de Jesuo al superpova preĝado. El tio ja rekte sekvas la povo pri mantuŝa sanigo kaj plenumiĝanta profetado. Ĉiu kredanto kapablas pri tio - post sufiĉe faka instruado kaj speciala inico. La tuta metodo baziĝas sur miaj dumvivaj esploroj pri la ĝusta interpretado de kelkaj misteroj el la Malnova Testamento. Cetere, ĉu vi jam legis mian novan libron pri tio?”

„Umm, huu, ... ne. Nur vian 'Direktado de entreprenoj laŭ bibliaj principoj' mi legis.”

„Tute ne ĝenas, kara frato. Mi alportos por ĉiu kursano ekzempleron. Sed evidente tiujn vi pagu ekstre, ĉu?”

„En ordo. Mi transportigos vin de la Frankfurta flughaveno. Poste estos duhora veturado ĝis Marburgo, kie troviĝas nia misiejo. Do ĝis nia ekvido. Dio benu vin.”

„Nia Sinjoro gardu vin.”

Klakis kaj la lineo estis silenta.

La planita profeta kurso estis granda sensacio por la junaj subsalajritaj dungitoj de la misiejo. Ĉiuj laŭpove preparis sin per fervora preĝado kaj vespera legado de la biblio. Frederiko estis instiginta ĉiujn misianojn optimume antaŭstudi por la kurso. Li ne hontu pro ies biblia nescio. En lia malgranda misia mondo - enklavo tre for de ĉiu ajn realo - lia ĉiu vorto estis sankta leĝo. Rezulte Sandra kaj Helena nun komune genuiĝis por preĝi ĉiun tagmanĝan paŭzon - okupo iom diverĝanta de ilia normala ĉiutaga kutimo veturi en la urbon - la misiejo fakte estis du kilometrojn ekster Marburgo - por aĉeti tranĉojn de torto kaj fritkukojn. Normalokaze jaŭdo estis la oficiala tutdungitara preĝa tago. Ĉiun jaŭdan matenon ĉiuj dungitoj devis kunveni por speco de rito, kiun frato Frederiko okazigis. En tiuj kunvenoj li longege kaj tre basvoĉe predikis. Ĉar li tre volonte aŭskultis sin mem, tiuj ĉi diservoj kutimis seninterrompe ĝisdaŭri la tagmanĝan paŭzon. Dum tiu preĝa kaj predika aktivado oni simple malŝaltis ĉiujn telefonojn, por tio, ke ne estu iuj ĝenoj.

Pro la venonta profeta kurso nun ĉiu tago iĝis preĝtago. Sekve neniu el la fervoraj misianoj plu okupiĝis pri la telefono. Feliĉe por la ĝenerala

organizada fluo kaj trakto de komercaj aferoj du dungitoj de programada firmao laboris en la misiejo. Tiuj - tute ne kristanaj junaj viroj, ĉirkaŭ tridekjaraĝaj - okupiĝis pri novaj komputilaj programoj por la amasdissendo de kvestalvokoj kaj la pli rapida kontado de la ricevitaj monsumoj. Normalokaze ili laboris tre silente antaŭ kvar ekranoj en la komputilejo.

Programistoj estas tre adaptiĝemaj homoj. Tiaj ili devas esti, ĉar ili ekkomprenu sen iu ajn speciala branĉa edukado la laborfluron de tre diverĝantaj entreprenoj agantaj en neniel interrilatantaj laborterenoj. Tiel okazis, ke post tuta jaro da laborado ĉeloke tiuj du spritaj nekredantoj ĉiun preĝmatenon provizore traktis la telefon Alvokojn de la plene frenezaj donacantoj kaj la eĉ pli frenezaj spiritaj kaj komercaj partneroj de la misiejo, celantajn la vere jam puninde frenezajn membrojn de la misiejo. Intertempe la helpema duo kapablas perfekte trakti tiajn alvokojn. Ĉe tio ili taskkonforme kamuflis sin per la nomoj „frato” Petro kaj „frato” Danjelo. Ilia sukceso ĉe tiu nekutima okupo estis tia, ke nur unu el dek alvokoj devis atendi la finpreĝadon de aŭtenta misiano por trovi sian solvon. Pro tio oni petis ilin dum la profeta kurso, kaj jam antaŭe, tuttage deĵori ĉe la telefonoj. La misiestro Frederiko estis tute kontenta pri tiu aranĝo kaj maldomaĝis la 500 eŭrojn, kiujn li ĉiutage pagis po programisto kaj kiuj nun ne plu fluis en la novan programon sed en telefonadon. Por li, jen simple speco de nereкта investo en superpova preĝado.

Frato Frederiko estis granda kredanto pri preĝado. Do se io malĝuste funkciis en la misiejo aŭ se pro iu maltrafa reklamado la fluo de mono iel ŝtopiĝis, li kutimis tuj kunvoki sian sekvantaron por komune tre laŭte kaj fervore preĝi pri rea pliboniĝo de la situacio. Lia preĝemo etendiĝis eĉ al teĥnikaj aferoj. Tiel kiam la du programistoj raportis, ke la projekto prokrastiĝos nur pro tio, ke la plurfaza retrorulo de la Informiksa datumbanko laŭŝajne ne ĉiam ĝuste funkcias, frato Frederiko, malgraŭ la evidenta enigmeco de tiu sciigo, tuj preĝigis sian skipon pri baldaŭ riparita retrorulo. Laŭ lia logiko por tio neniel necesis, ke la preĝantoj sciu ion pri tiuj strangajoj. Plene sufiĉis, ke Dio scios tion. Fakte Dio dankis lian fidon per tio, ke la firmao Informikso tuj liveris „sencimigitan”, do riparitan version de sia pekinta produkto.

Intertempe la programistoj vivis en perfekta simbiozo kun la misianoj. Ili komencis jam eĉ memstare decidi pri diversaj ĉetelefonaj demandoj - „Jes, presu ĉi-monate 100 000 ekzemplerojn de 'Kristanoj en marŝo'”, „Ne, refaru la kovrilon”, „Jes, tio estas en ordo, sed mi petas uzi alian tiparon por la subtitolo 'Frato Frederiko vizitas orfejon en Ukrainio'”, „Nepre alsendu la adresbendon ĝis postmorgaŭ, frato Alfredo”, „Ne, kara fratino je Jesuo, vi ja plu rajtas mendi. En nia libroservo la titolo 'Sciencaj pruvoj pri la ekzisto de Dio' tute ne estas elĉerpita”, „En la presprovaĵo estas mistajpo ĉe la biblia verso piede de la lasta paĝo”. Ofte estis ĝuste tiuj ĉi programistaj agoj kaj decidoj, kiuj dum la pasinta jaro tiom sukcesigis la misiejon. Evidente Frederiko estis konvinkita, ke temis pri la efiko de la komuna jaŭda preĝado. Pro tio li estis konkludinta, ke se komuna normala preĝado jam tiom bone efikis, do komuna superpova preĝado devos ja multoble efiki. Li revis jam ne plu pri monfluo de bagatelaj 4 milionoj da eŭroj, sed pri monfluo de 100 milionoj da eŭroj kiel ĉe la granda „Diakonia Fondaĵo”. Pro tio Zandero venu kaj instru ĉiujn pri superpova preĝado.

Aldone li mem suferis iam kaj iam de tinito, tre ĝena fajfeto en lia maldekstra orelo. Eble oni povos per la kombino de komuna superpova preĝado kaj plurpersona mirakliga mantuŝo kuraci tion. Kaj la komputilestro, frato Karlo, jam junule, longe antaŭ la fondado de la misiejo, iam estis suferinta de leŭkemio. ►



► Post plurjara ĥemia terapio li estis laŭdire resaniĝinta, sed estis principe ĉiam danĝero de remalsaniĝo.

Specifan lundon alvenis la profetotrejnisto Gido Zandero. Post mallonga bonvenigo Frederiko decidis montri al li ĉiujn ĉambrojn de la misiejo. Al tiuj apartenis memkompreneble ankaŭ la komputila centrejo kun la efektive tute nova komputilego. Do Frederiko kun sia sekretariino kondukis la gaston tien.

La du programistoj ne tuj rimarkis, ke oni eniris la ĉambron. Ambaŭ komune serĉis pri stranga fenomeno ĉe la kontada inversigo de alkontigaĵo okaze de nemona donaco. Ŝajne temis pri la ioma eraro de la damninda datumbanko, pri kiu ili ne respondecis. Eble Frederiko denove preĝu.

Frederiko kondukis sian gaston en la ĉambron.

„Jen frato Karlo, la estro de la komputiloj,” anoncis Frederiko.

Karlo, kiu rigardis trans la ŝultrojn de la programistoj al la sama mistifikanta ekrano, murmuris ion nekompreneblan.

„La komputilego estas tute nova,” fiere rakontis Frederiko, „temas pri Uniksa sistemo. Pli bona komputilo ne ekzistas kaj ni esperas tre multe de ĝi por nia Diserva laborado. Ni ricevas tute novan programon por ĝi. Ĉio ĉi ege kostas.”

Intertempe la alparolita komputilestro kaj la du programistoj ekstaris kaj turnis sin al la direkto de la vizitantoj.

„Kaj jen frat... sinjoro...” - Frederiko haltis pro embaraso. Evidente tute ne temis pri fratoj. Fakte frato Petro estis inferon meritanta ateisto. Same pri Danjelo. Sed aliflanke Frederiko simple ne plu kapablas memori la familiajn nomojn de la du programistoj por adekvate nefratigi ilin. Ĝuste kiam lia fidela sekretariino, Ingrida,

volis helpi lin, li klopodis denove per ĉiosolva gambito. Oni simple rezignu pri la fratigo.

„Jen Petro kaj Danjelo, la du programistoj, kiuj ebligas ĉiujn ĉi komputilajn mirindaĵojn por ni. Mi komprenas vere nenion pri komputiloj, kaj por mi ĉio ĉi ĉiam restos enigmo.”

„Saluton,” afable diris Petro, la pli parolema el la du. Lia kolego Danjelo mallaŭte eĥis lian saluton. Dume la senfratigita Petro cerbumis pri tio, ĉu li prefere adresu la jam de monato sufiĉe pompe anoncitan profetotrejniston per „frato Gido” aŭ per „s-ro Zandero”.

„Saluton”, respondis frato Gido. Instinkte li sentis grandan danĝeron radiantan de tiuj du programistoj. „Sed ili ne partoprenos la kurson, ĉu?” li iomete mallerte aldonis.

„Ne, ne,” respondis la misiestro, „sed ili deĵoros la tutan semajnon ĉe la telefono. Fakte sen ilia afabla helpo, ni ne povus okazigi tutsemajnan seminarion kun ĉeesto de la tuta misieja skipo, frato Gido.”

Petro intertempe decidis alparoli Zanderon per „frato Gido”, kaj post horkvarona demonstracio pri komputiloj kaj la avantaĝoj de la nova programaro la karavano kontente preterpasis por viziti la transportan sektion etaĝon pli malsupre. Novdate oni kvestis ne nur por aĉeti bibliojn, sed ankaŭ por financi nutraĵtransportojn por malsatmortantoj en Afriko. ■

(La daŭrigo aperos en la venonta numero)

## Korekto

Post la novelo *Nerekonebla* en la maja numero forfalis la jena mencio:

La novelo meritis laŭdan mencion en la arta konkurso LIRO en la jaro 2000, organizita de la eldonejo Sezonoj.


La eldonejo pardonpetas.

# Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo.

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Prezo 9 EUR (plus afranko).  
Se vi mendos 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA





# Tri variantoj de unu bildo

Ĉiu lando ŝatas fieri pro siaj eminentuloj, ĉu komponistoj, ĉu pentristoj, ĉu politikistoj... Ankaŭ ĉiu loĝloko.

**N**ia provinco kompare kun la aliaj kaj enlandaj kaj eksterlandaj, estas relative juna – nur iom pli ol 350-jara. Sed ankaŭ ni povas fieri – ĉi tie naskiĝis kaj loĝis sufiĉe famaj personoj. Inter tiuj estas fama rusa pentristo Ilja Repin – li naskiĝis meze de la 19a jarcento en malgranda urbeto Ĉugujev tre proksime de Ĥarkov. Fininte Artakademion en Sankt-Peterburgo ...

Mi ne metas kiel celon priskribi la longan kaj aktivan vivon de la fama pentristo, ankaŭ liajn multnombrajn bildojn, inter kiuj estas la mondfamaj „Portreto de Leo Tolstoj”, „Portreto de A. Pisemskij”, „Portreto de M. Musorgskij”, „Portreto de N. Pirogov”, „Oni ne atendis”, „Ivan la Terura kaj lia filo Ivan” (ĉiuj troviĝas en Tretjakov-artgalerio en Moskvo), „Tiristoj ĉe Volga” (Ŝtata Rusa Muzeo en Sankt-Peterburgo) kaj multegaj aliaj.

Mi ŝatus ĉi tie prezenti verŝajne ne de multaj konatan historion, kiel estis pentrita la fama bildo „Zaporoĵiaj kozakoj verkas leteron al turka sultano”. Foje dum ripozado Repin ekaŭdis de D. Javornickij, historiisto de Ukrainio, leteron vere verkitan de zaporoĵianoj al tiutempa turka sultano Mahomet la 4a, kiu postulis de la kozakoj obeemon. La respondo estis kuraĝe impertinenta, aŭdaca, plena je moko kontraŭ la sultano. La letero admirigis la pentriston kaj tiam aperis la unua krajona malnetaĵo, kie estis la ĉefa ideo de la estonta bildo – ĉirkaŭ tablo kun profesia skribisto kolektiĝis kozakoj, diktantaj la respondon por la sultano. Ekde tiu periodo plurajn jarojn Repin laboris pri la bildo. En 1880 la unua olea skizo estis finita. Sed la

majstro mem ne estis kontenta pri ĝi kaj daŭrigis labori. Entute ekzistas tri variaĵoj de la bildo. En tiu unua skizo, kiu en 90aj jaroj estis iom reformita kaj korektita, estas ne tiom granda kvanto da zaporoĵianoj, kiuj ĉirkaŭas la

ŝanĝiĝis la fono – la malproksimo estas anstataŭita de moviĝantaj figuroj, fumo de lignofajroj, kio montras la vivon de Zaporoĵia Siĉj („Siĉj” – loĝloko de kozakoj ĉe Dnepr, kie situis la kozakaj milit-trupoj de la 16a ĝis la 18a jarcentoj).

Ankaŭ tiu dua variaĵo de la bildo ne kontentigis la pentriston. La tria kaj plej granda bildo estis finpentrita en la 1891. Kiam la bildo estis finita, la unuan fojon ĝi estis eksponita dum la jubilea Repin-ekspozicio, dediĉita al 20-jara pentroagado de la majstro (1891), ĝi estis kritikita de kelkaj personoj. Malgraŭ tio la bildo havis grandegan sukceson kaj estis aĉetita kontraŭ tre alta tiutempe prezo – 35 000 rubloj. La prezo estis tiom alta, ke eĉ Tretjakov ne havis eblecon ĝin aĉeti. La aĉetinto de la bildo estis la rusa caro Aleksandro la 3a. Nun ĝi troviĝas en Ŝtata Rusa Muzeo.

Dmitrij CIBULEVSKIJ



La unua variaĵo de la bildo.



La fina variaĵo de la bildo.

skribiston kaj ridegas. Fone estas videbla malproksime la rivero Dnepr. En 1891 estis finita granda bildo, kiun aĉetis Pavel Tretjakov (konata mecenato kaj fondinto de la mondfama moskva Tretjakov-artgalerio). Ĝi troviĝis en la artgalerio, sed en 1930 la bildo estis donacita al Ukrainio kaj nun troviĝas en Ĥarkova ŝtata artmuzeo. Ĝi jam entenas multnombrajn aldonitajn personojn, pluraj el kiuj poste aperis en la finverko farita en 1891. Plene



Memportreto de I. Repin.



# Por spiritlegaĵemuloj

August Vermeylen (1872-1945) estis flandra verkisto, kies verko *De wandelende Jood (La migranta judo)* unue aperis en 1906. Mi antaŭ nun ne konis ĉi tiun verkiston, kaj legante la verkon mi malfacile kaj nur iom-post-iom sukcesis kompreni ĝian karakteron. La unua ĉapitro, „Ahasvero kaj la Nazaretano” impresis min kvazaŭ teksto uzita de Cecil B. DeMille por unu el ties konataj biblispektaklaj filmoj. Kun siaj grandnombraj anakronismoj, superaktivaj rolantoj, kaj intrigo malfidele bazita sur la evangelioj en la Biblio, mi demandis min, ĉu mi senintence akceptis recenzi ian religian propagandan broŝuron. La „Nazaretano” evidente estas Jesuo; pri Ahasvero mi devis serĉi mian memoron, kaj poste enciklopedion, por trovi, ke tiu estis la nomo de ulo en rakonto „Kurze Beschreibung und Erzählung von einem Juden mit namen Ahasverus” („Mallonga priskribo kaj rakonto pri judo kun la nomo Ahasverus”) aperinta en 1602. La nomo poste aperis en diversaj rakontoj kaj legendoj, kiel tiu de judo en la tempo de Jesuo, kiu mokis Jesuon kaj neniam mortis sed vagadas la teron ekde tiam. Nu, ĉi tiu unua ĉapitro priskribas la proceson kontraŭ kaj ekzekutiĝon de Jesuo, laŭ la vidpunkto de Ahasvero.

Ĉapitro du estas titolita „Ahasvero survoje al la infero”. Ĝia enhavo memorigis min pri diversaj legendoj pri fremdaj popoloj, troveblaj en antikvaj grekaj kaj romiaj verkoj: tribo en Afriko, kiu lasis sin regi de arbarpavianoj; pedikhomoj, kiuj vivas nudaj en valo kaldronforma, k.s., k.s.. Post tio la enhavo similas iomete al *Infero* de Dante. La lasta frazo en la ĉapitro diras: „Kaj plej terure estis al li, ke super tiu Infero ploras pro li la okuloj de Kristo.” Ĉu do ja vere temas pri propaganda religia verko, kiu celas teruri la leganton pri vivo en la Infero pro malakcepto de Kristo?

Unuavide, la titolo de la tria ĉapitro ŝajnis konfirmi tiun konkludon: „Ahasvero survoje al la ĉielo”. En tiu tria ĉapitro ni renkontas sanktulon, maljunan ermiton loĝantan en arbaro, kiu penas konvinki Ahasveron pri ia speco de mistikismo: „Se vi nur supozas ke Dio estas, vi povas do trovi nemon alian. Li estas la Nenomebla



Lumo. Kiel ĉiuj flamoj supren saltas, tiel ankaŭ via animo povas nur sori al la Lumo.” Nu, tian mistikismon mi ofte trafis en mezepokaj libroj, el kiuj pluraj estas plu popularaj nuntempe inter multaj religiuloj. Evidente, la rakonto ne temas pri kutima propagando kristana. La nuntempaj evangeliistoj neniel urĝas mistikismon. La ĉapitro kulminas per vizio de Kristo, kiu „disverŝis la sangan el la aperta brusto ĉielen kaj super ĉiujn” kaj finas la ĉapitron tre longa frazo: „Ankoraŭ unu momenton Ahasvero aŭdis la orgeneskan tondradon de la Keruboj kaj Serafoj en la lumo, – guto da sango de Kristo falis sur lian koron kiel fajra roso, kaj la krusto krevis, lia koro disfendiĝis, kaj brak-etende li falis sob, al la sufero kaj la necerta krepusko, malbenita, disŝirita, sed plene malferma de amo.” Iom romkatolika versio de mistikismo, mi pensis, verŝajne multe influita de, sed neniel bazita sur, *Paradizo* de Dante.

Tamen la kvara ĉapitro tre surprizis min. Ĝia titolo „Ahasvero inter la homoj” supozigis al mi, ke mi legos pri agado de Ahasvero dum li proklamas siajn sanktan vizion kaj sperton al la homaro. Sed efektive la enhavo estas tute alia. Ahasvero fariĝas simpla laboristo, tre simpla laboristo, kiu travivas la misfortunon de la laborista klaso. La malsato, la malsano, plena mizero, duonsklaveco. Kaj senĉesa vagado, dum kiu Ahasvero – kaj ni – serĉadas la veron. „Li pensis pri ĉio okazinta, – pri la kantado de la anĝeloj en la eterna aŭtoro, pri la kantado de la sireno en la arda obskuro, – sed sen bedaŭro, sen pentoj; ili ĉiuj estis voĉoj

kiuj eĥis en la voĉoj de la granda revo, kiun li antaŭsentis sed kiu, plimaturiĝanta sen fino, ne estis revo ... Tiam ili kune ekmigris en tiun mondon: ĉar la Vaganto sciis, ke vagi li devas, kun gaja animo, kaj ke nenio estas pli sana ol tia vagado ... Tiel ili iris, perlaborante sian panon iel-tiel, renkonte al nova batalo por la vivo, al novaj suferoj kaj novaj kulminoj, – tiel ili ankoraŭ iras, kaj kio estos la lasta kulmino kaj la fino de la vojo, tion feliĉe neniu povas rakonti.” Per tiuj vortoj la verko finiĝas.

La malantaŭo de la kovrilo de la broŝuro diras ke *La migranta judo* havas aŭtobiografian nuancon. Evidente, nuancon de *internaj* travivaĵoj de la aŭtoro. Kaj verŝajne pro tio, tiom forte impresas la vivideco de la enhavo en ĉiu el siaj ĉapitroj.

Libro de propagando la verko ne estas. Nek filozofiaĵo ĝi estas. Nek, evidente, de konkretaj travivaĵoj. Pli ĝuste, eble, ni komprenu ĝin kiel ian modernan „Dia komedio”-n, ne bazitan sur tiu de Dante (ĉ. 1310-1314), sed multe influita de ĝi. Ĝi havas ankaŭ alegorian karakteron, similan al tiu de *La progreso de la pilgrimo* de Bunyan, (eldonita en 1678, verkita laŭ la angla puritana skolo); tamen, laŭ mia opinio, *La migranta judo* estas multe pli bone verkita, kaj multe pli animtrafa ol la verko de Bunyan. Se mi ĝuste detektivis inter la multaj aludoj en *La migranta judo*, ĝia fono estas la deknaŭjarcenta romkatolikismo, aŭ spirita sinteno tre simila al tiu.

Do: bone verkita, kaj por spiritlegaĵemuloj tre rekomendinda libro. Ne tiom pensiga, kiom sentiga.

Unu malgranda protesto pri la traduko: min ĝenis la abundaj piĉismoj (*deale, -ed-, erst, forsin, hilo, -im-, nelge, ste, tras*, kaj aliaj); ankaŭ „ma” (= sed), kaj diversaj aliaj revizioj de la Esperanta vortaro.

Aliflanke, la tradukinto kelkfoje faris bonan stilan variadon inter mal-vortoj kaj iliaj anstataŭaĵoj, kvankam evidentas, ke li preferas plej ofte eviti mal-vortojn. Tamen, la stilo de la traduko estas vigla kaj bona, tre malofte riproĉinda. Do, kiel la enhavo de la verko mem, ankaŭ la tradukaĵo plaĉas aŭ malplaĉas laŭ onia subjektiva prefero.

Donald BROADRIBB

August Vermeylen: *La migranta judo*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2000. 71 paĝoj vinktitaj. ISBN 90 71205 90 8. Prezo ĉe FEL: 8,00 EUR + afranko.



# Komprenu vian preĝadon ...

Ofte, se kredanto instruas siajn infanojn preĝi, oni aŭdas la kritikon, ke la infanoj ne vere scias, kion ili diras. Do, necesas instrulibro, kiuj klarigas al infanoj la signifon de ilia preĝado. Tia instrulibro estas *Patro Nia*. Ĝi klopodas klarigi la vortojn kaj la signifon de la Sinjorpreĝo aŭ Patronia.

Estas iom malklare, kiu estas la verkinto de la libro. Ĉu Francisco Cândido Xavier, kiu sur la kovrilo prenas la rolon de oficiala verkisto? Ĉu iu Emmanuel, kiu subskribis la enkondukan tekston? Ĉu iu mistera Meimei, kies spirito „diktis” la libron kaj kiu estis „valorplena misiulino kaj sindona instruistino...”?

La libro dividiĝas en ok ĉapitrojn, kiuj ĉiuj havas frazon el la Patronia kiel elirpunkton kaj klarigendaĵon. La klarigoj (aŭ ĉapitroj) ĉiuj sekvas pli-malpli la saman strukturon. Unue venas situaciigo kaj teoria klarigo de la signifo de la linio, kiun Jesuo elparolis. Poste sekvas kelkaj beataj rakontoj kiel ilustraĵoj. Ili estas iom



naivaj, tradicie instruemaj kaj sufiĉe forte moralinstruaj. Ili estas de la tipo „kiel malbonulo iĝis bonulo” kaj kompareblas kun la rakontoj „kiel iu bestospeco akiris sian...”. La temoj estas iom malmodernaj, ekzemple: kiu ĝoje laboras, montras sian dankemon al dio; tamen ankaŭ modernaj temoj trovis sian vojon en la libron: kiu helpas plantojn kaj bestojn, esprimas sian dankon al dio kaj per tio aniĝas al la moderna verdula movado. Iom malpli akceptebla estas, ke iufoje la klarigoj estas tro for de la enhavo de la teksto. Okulfrappe tio okazas ĉe la klarigo „Ne forlasu nin en tento”, kaj ankaŭ la lasta frazo ne ricevas adekvatan pritraktadon.

Por iom ilustru tiun moralinstruemon kaj naivan malmodernecon jen unu el la rakontoj: *Kiam la Ĉiela Patro bezonis meti sur la Teron la unuajn infanetojn, li venis al la konkludo, ke li devas voki iun, kiu sciis senĉese pardonon. [...] Oni diras, ke nia Ĉiela Patro longe*

*konsideradis, konsideradis... ĝis li vokis la Virinon, donis al ŝi la titolon Panjo kaj al ŝi konfidis la infanojn.* Same malmoderna estas la kaŝita averto, ke labori estas bone kaj ne labori malbone, kaj aliaj tiaj ideoj.

Post la rakontoj sekvas kelkaj pripensindaĵoj aŭ primeditaĵoj. La tuton ilustras beletaj porinfanaj desegnaĵoj.

Kiom ajn oni pensas pri la aliro al la temo, primediti la fundamenton de la vivo indas, kaj eĉ se oni ne konsen-

tas kun la konkludoj, la libro povas esti taŭga instigo al primeditado de profundaj, bazaj, homecaj valoroj. Certe, kristano povas kun iom da persona adaptado kaj kreiveco uzi la libron por instrui siajn infanojn. Eble nekredanton tamen fortimigos la maniero laŭ kiu la aŭtoro(j?) prezentas la aferon.

Guido VAN DAMME

*Patro Nia*, Diktita de la Spirito Meimei, Francisco Cândido Xavier. Ilustris: Joel Linck. Tradukis: Affonso Soares. Eldonis: Societo Lorenz, Chapecó, 2000. 104 p. ISBN: 85-7328-026-3. Prezo ĉe FEL: 10,00 eŭroj + sendokostoj.

## Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko  
<http://retbutiko.esperanto.be>

### 1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR

### 2 K.J.K. Vroegop

Johano Prezo: 7,50 EUR

### 3 Anna Löwenstein

dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

### 4 Peter J. Tomson

La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

### 5 August Vermeylen

La migranta judo Prezo: 8,00 EUR

### 6 Lena Kapunina

La bato Prezo: 12,00 EUR

### 7 Pasporto al la tuta mondo

(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR

### 8 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck


Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR

### 9 Maria Becker-Meisberger

dua eldono Internacie kuiri Prezo: 10,00 EUR

### 10 Leopold Vermeiren


Brulanta kastelo Prezo: 3,00 EUR



Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Fakse: + 32 3 233 54 33



# Aĉeti mortintojn



La ruslingva originalo de ĉi tiu romano unue aperis en 1842, kiel la unua volumo en planita tri-voluma serio. Volumoj du kaj tri, tamen, neniam aperis. Ĝi estas unu el la plej

famaj rusaj romanoj, kaj rangas kiel klasikaĵo de la rusa literaturo.

Krom esti klasika, ĉi tiu romano estas tre distra humuraĵo. (Se mi aŭdacas diri tion, ĝia intrigo estas eĉ, siamaniere, iomete komparebla kun tiuj de la angla verkisto P.G. Wodehouse.) La verkinto, kompreneble, celis ruslingvan legantaron, kaj lia satirado de la rusa socio tiutempa estas ofte amuza, kelkfoje cerbumiga (kvankam granda nombro da postnotoj de la tradukinto multe helpas la nerusan modernan leganton), kaj plej ofte facile komprenata.

La intrigo mem estas drole prezentata: iu nekonato, Paŭlo Ivanoviĉ Ĉiĉikov, kun siaj du servistoj kaj triĉevala kaleŝo, trairas diversajn partojn de Rusio, familiariĝante kun la plej riĉaj kaj plej influaj servutul-posedantoj en ĉiu loko. Li proponas al ĉiu el ili tre strangan aferon: li volas aĉeti la servutulojn mortintajn post la lasta censo.

Estas al ni klarigite ke, por faciligi la ŝtatimpostadministradon, en ĉiu censo ĉiu servutul-posedanto faras liston de siaj servutuloj. Surbaze de tiu listo, li devas pagi imposton, po certan sumon por ĉiu servutulo. La listo validas ĝis la sekva censo. Do inter la censoj la posedanto plu pagas impostojn por la servutuloj nomitaj en la lasta censo, eĉ se ili jam mortis. Ĉiĉikov proponas liberigi la servutul-posedantojn de iliaj impostpagoj, aĉetante tiujn mortintajn servutulojn.

Kiel do oni aĉetas mortinton? Evidente ne ties kadavron. Kadavroj tute ne interesas Ĉiĉikovon. Nek ties spiritoj. Spiritoj apenaŭ estas vendeblaj. Kion do li aĉetas? La vendantaj servutul-posedantoj gratas la kapon pri tio. Kelkaj opinias ke temas pri eksterordinara ŝerco; aliaj suspektas ian ruzon; iuj ekkredas

# Pensoj kaj sentoj

La libro *Esprimo de sentoj en Esperanto* de la fama esperantisto Edmond Privat allogas jam per sia titolo. Kiu ne volas bele kaj ĝuste esprimi siajn pensojn kaj sentojn? Tamen ĉi tiu libro estas nek vortaro de bildecaj esprimoj, nek lernilo pri uzado de afiksoj aŭ ĝenerale vortfarado, nek praktika gvidilo simila al „Kiel diri al la knabino pri sia amo” aŭ „Kiel priskribi siajn suferojn kaŭzitaĵojn de venonta vizito al dentisto”. La libro estas adresita al amantoj de lingvo, kiujn interesas la esprimaj rimedoj kaj ebloj de Esperanto aparte kaj kompare kun aliaj lingvoj. Lingvamaj personoj povas fariĝi studentoj de doktoro E. Privat – ja la verko estas resumo de lia kurso por lingvosciencia fakulo de beletristika fakultato. Ne konfuziĝu, se vi ne konas lingvistikajn terminojn. La aŭtoro intence evitas ilin por fari la verkon komprenebla por ĉiu. Plie, la stilo de E. Privat estas tiom facila kaj alloga, ke, eĉ se li dezirus klarigi ion speciale sciencan, la leganto komprenus ĉion, ne rimarkante malfacilaĵojn. La rakonto estas mirinde figura: ĉu vi komparis iam fundamenton de lingvo kun klavaro de piano, aŭ homon, malbone parolantan en fremda lingvo, kun ties sklavo?

La verko enhavas dek ĉapitrojn. El la aŭtoro enkonduko oni ekscias, ke la unuaj kvar ĉapitroj koncernas la lingvon Esperanto ĝenerale, sen speciala atento al esprimrimedoj. La sekvantaj ses ĉapitroj priskribas, kiel elementoj de la lingvo iĝas iloj por sentesprimado. Oni povas tre facile orienti sin en la libro, ĉar ĉiun ĉapitron antaŭas detala listo de ĝiaj temoj.

E. Privat plurripetas, ke la libro ne pretendas esti plena kaj sistema studo de esperanta stilistiko, sed ke ĝi nur montras la vojon al tia studo kaj celas vekti intereson pri ĝi.

La aŭtoro asertas, ke ĉiuj lingvoj uzas esence la samajn esprimrimedojn. Li konsideras kvin ĉefajn rimedklasojn: sona plilaŭtigo de iu aŭ alia frazero, ŝanĝo en vortordo, forigo aŭ ripeto de vortoj, elekto de pli taŭgaj vortoj, kreo aŭ modifo de vortoj. Evidentiĝas, ke Esperanto malgajnas kontraŭ naciaj lingvoj nur en kvanto de sinonimoj; samtempe ĝia ebleco produkti novajn vortojn estas senlima.

E. Privat analizas fortajn flankojn de Esperanto rilate al sentesprimado kaj klarigas kialojn de malsukceso de iuj esprimrimedoj.

Ni konsilas legi tiun ĉi verkon al adeptoj de la „severa” parolstilo, al tiuj, kiuj timas uzi „nevortarajn” vortojn kaj „nelemlibrajn” esprimojn. Eble, la aŭtoro konvinkos tiajn esperantistojn, ke ĝuste nekutimaj, neatenditaj parolturnoj estas la plej trafaj por esprimi „sentan koloron”.

La tuta libro estas trapenetrita de amo al Esperanto kaj de konvinkiteco pri ĝia esprimpleneco. Tia konvinkiteco altiras legantojn kaj, interalie, faras tiun ĉi verkon riĉa fonto de argumentoj, kiujn tiom ofte esperantistoj ne povas trovi en disputoj kun neesperantistoj pri la valoro de Esperanto.

La unua eldono de *Esprimo de sentoj en Esperanto* aperis en 1931. La nova eldono, pretigita de Internacia Esperanto-Instituto, estas jam la kvina. Kiel aneksaĵojn la libro enhavas kronologian tabelon de la vivo de ĝia talentega aŭtoro Edmond Privat kaj eltiraĵon el lia bibliografio.

Anna kaj Mati PENTUS

Edmond Privat: *Esprimo de sentoj en Esperanto*. Eld. Bambu Ltd, Varna, 2000. 56 paĝoj glue binditaj. ISBN 90-805651-1-3. Prezo ĉe FEL: 6,60 eŭroj + afranko.

ke verŝajne mortintaj servutuloj havas ian komercan valoron pri kiu ili antaŭe ne sciis, kaj volas marĉandi pri la vendo-prezo. Ĉiĉikov neniam eksplikas; al li gravas nur ke la posedanto subskribu validan vendkontrakton, por kio li ricevas pagon interkonsentitan kun Ĉiĉikov.

La leganto mem informiĝas pri la kialo de la aĉetado nur en la plejlastaj paĝoj de la romano. Mi ne volas forpreni de novaj legantoj la plezuron mem konjekti pri ĝi, kaj mem trovi la eksplikon de tiu mistero.


La traduko plejparte estas glata, sed

mi konsilas al la leganto havi ĉemane bonan vortaron por serĉi eksplikojn pri diversaj (malnov)-rusaj ĉiutagaĵoj. Lingve, stile, historie, kaj en have ĉi tiu eldono rajtas stari inter la aliaj verkoj en la serio Oriento-Okcidento.

Nur unu riproĉeto: la bindo ne estas tre fortika. Donald BROADRIBB

Nikolaj Gogol: *Malvivaj animoj*. Tradukis el la rusa Vladimir Vyĉegjanin. Serio Oriento-Okcidento n-ro 32. Eld. Sezonoj, Jekaterinburg, 2001. 224 paĝoj, binditaj. Neniu ISBN indikita. Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko.





## Abonantoj en Francio

Flandra Esperanto-Ligo regule ricevas ĉekojn el Francio de homoj kiuj volas pagi fakturon aŭ abonon al MONATO. Tiuj ĉekoj (palblukoloraj) portas belan eŭro-simbolon. En etaj literoj tamen ankaŭ troviĝas la mencio "payable en France". Malgraŭ malaperintaj landlimoj kaj komuna valuto tiujn ĉekojn FEL (en Belgio) ne povas enkasigi sen pagi altajn bankkostojn. Ni urĝe petas niajn francajn klientojn ne sendi tiajn ĉekojn sed uzi alian pagvojon. Ili povas ekzemple ĝiri la monon al la poŝtĉekoficejo de Bruselo por konto 000-0265336-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Belgio aŭ sendi internacian poŝtmandaton. Ankaŭ pagi pere de UEA-konto fela-x eblas.

Ni kore dankas al niaj francaj klientoj pro ilia komprenemo.

Gerd Jacques (librotenistino)



Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la kompreniĝo inter kristanoj el la tuta mondo. Tiu ĉi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta

Esperanto-movado. Kaj ĝi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantaĝoj kristanaj esperantistoj ĉiam denove konsciiĝas.

Paĝoj: 142; 21 cm; kudre bĉndita;  
Prezo: **7,50 €**

Informoj:  
tlf. +32 3 234 34 00;  
tlk. +32 3 233 54 33;  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de

# Plia metamorfozo

Eminenta esperantisto Reinhard Haupenthal ekstreme malkontentis pri la antaŭaj esperantaj tradukoj de ĉi tiu novelo, klasik-aĵo de la moderna literaturo, kaj entreprenis fari novan. Jen la rezulto.

La rakonto mem estas tre konata en la moderna mondo, ankaŭ ekster la germana literaturo, en kiu ĝi originis. Ĝi estis, kelkriate, la sola grava verko de Kafka, kiun li permesis publikigi dum sia vivo. (Liaj aliaj ĉefverkoj aperis nur longe post 1915, la aperjaro de *La metamorfozo*.) Iom interese, Haupenthal diras, en sia Antaŭparolo, ke „Kafka apartenas ne nur al miaj plej neŝatataj aŭtoroj, sed mi rekte abomenas lin. Mi dubas kaj kontestas, ke lia *Metamorfozo* meritas la atenton kiun eŭforia hordo da germanistoj aŭ ditirambe galimatiaj interpretistoj atribuas al ĝi.” Ŝajnas, ke li faris la tradukon pli kiel rebaton al Mauro Nervi, kiu jam en 1996 publikigis sian propran tradukon de la novelo, ol pro amo al la verko aŭ al ĝia aŭtoro.

Nu, la kialon de lia malamo al Kafka kaj al *La metamorfozo* mi ne konas, sed mi mem tre amas la verkojn de Kafka, kaj al mi multe plaĉas la nova vesto, kiun, malgraŭ sia malamo, donis al ĉi tiu majstroverko Reinhard Haupenthal.

*La metamorfozo* temas pri tre stranga evento: junulo nomata Gregor subite, unu matenon, trovas sin transformiĝinta en ian fiinsekon. (Ĉu blato? Ĉu sterkoskarabo? Oni devas konjekti, Kafka mem ne precizigas.) Kompreneble, tio surprizas lian familion: liajn patron, patrion, fratinon, same kiel la servistinojn. Sed, nekomprenoble, ĝi tute ne surprizas lin mem. Li bezonas iom da tempo por kutimiĝi al sia nova formo, sed post kelkaj misprovoj li sukcesas manipuli sian korpon sufiĉe por povi sin turni kaj finfine ankaŭ marŝi. Li eĉ sukcesas turni ŝlosilon por malŝlosi la pordon de sia ĉambro.

Tamen, la familio kaj la servistinoj malpli facile akceptas la ŝanĝon. Kvankam ili ĉiuj jam de la komenco scias kaj akceptas, ke la fiinsekto estas la antaŭe amata Gregor, kaj ŝajne ili ne miregas pro la ŝanĝo, post sia unua ŝokiĝo, nur lia fratino konservas sian



amon al li. (Poste ankaŭ lia patrino iomete memoras sian amon al li, sed ne sufiĉe por akcepti lin en lia nova formo.) Ŝi zorgas doni al li manĝaĵojn, kaj kiam li rifuzas la normalajn manĝaĵojn, kiujn kiel homo li amis, ŝi zorgas trovi kiajn manĝaĵojn li nun preferas. Ĉar li trovas malfacila rampadon en la meblita

ĉambro, ŝi penas malplenigi ĝin kaj tiel doni al li pli da spaco.

Sed ankaŭ tiu amo malaperas, kiam montriĝas ke li nun havas la psikon de fiinsekto, kaj ne plu havas homajn sentojn (aŭ ĉu? Kvankam fiinsektiĝinte, Gregor neniam perdas la tuton de sia spirita homeco).

Lin grave vundas la patro, kiu strebas repuŝi lin en lian ĉambron; poste la patro ĵetas fruktojn kontraŭ lin, kaj grave difektas lian dorson. Fine Gregor mortas, restas nur disfalanta insektokadavro, kaj la familio sukcesas reakiri sian iaman feliĉon, eble eĉ pli ol ili havis antaŭ la misfortuno okazis.

Ĉu la rakonto estas ia alegorio? Aŭ nur koŝmara imagaĵo? Verŝajne, alegorio, kaj ne necesus multe fondiĝi en la vivospertojn de Kafka por kompreni tion. Eble, en la moderna tago ni povas vidi en Gregor bildon de la junulo, kiu ne plu estas senkulpa ĉarma infano, sed sin turnis al drogoj, aŭ estas trafita de aidoso, aŭ alimaniere fremdigas al si la konservativan socion.

Nun pri la traduko. Ofte oni diras, ke nia lingvo Esperanto, jam 113-jaraĝa, estas matura lingvo, kiun oni devus respekti kaj akcepti same kiel tradician etnan lingvon, sen streboj ĝin radikale ŝanĝi. Nu, ŝajnas, ke Haupenthal, tamen, preferas ludi per la lingvo. Li ne nur anstataŭigis ĉiujn mal-vortojn per „neologismoj”, sed ankaŭ provis kelkajn gramatikajn novaĵojn. Do iom eksperimentema traduko.

Tamen mi ĝuis la legadon, kaj iom strange la eksperimentema traduko iel kongruas kun la rakonto.

Donald BROADRIBB

Franz Kafka: *La metamorfozo*. El la germana tradukis Reinhard Haupenthal. Eld. Fonto, Chapeco, 2000. 59 paĝoj vinktitaj. Neniu ISBN estas indikita. Prezo ĉe FEL: 7,50 eŭroj + afranko.



# Monato

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

**Eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be) TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

**Ĉefredaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com)

**Redakcia sekretario:** P. Peeraerts.

**Reviziantoj:** Hector Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidéliusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij. Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

**Korektanto:** Izabel C. Oliveira Santiago.

**Grafiko:** Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



## MONATO - redaktoroj

**Arto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando. Reta adreso: [desperanto@mtu-net.ru](mailto:desperanto@mtu-net.ru)

**Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio. Reta adreso: [rotsaert@esperanto.be](mailto:rotsaert@esperanto.be) (nur askiaj dosieroj!) Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

**El mia vidpunkto:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com)

**Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio. Reta adreso: [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

**Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

**Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

**Komputado:** Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL. Reta adreso: [edmund@rano.org](mailto:edmund@rano.org)

**Leteroj:** Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reta adreso: [guido@fel.esperanto.be](mailto:guido@fel.esperanto.be)

**Libroj:** Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono. Reta adreso: [kolker@stratos.net](mailto:kolker@stratos.net) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

**Noto:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciante. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

**Lingvo:** YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reta adreso: [syama@dokkyo.ac.jp](mailto:syama@dokkyo.ac.jp) Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

**Medio:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapeŝt. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo. Reta adreso: [mattos@super.com.br](mailto:mattos@super.com.br)

**Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Scienco:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapeŝt. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando. Reta adreso: [gerrit.en.madzy@planet.nl](mailto:gerrit.en.madzy@planet.nl)

**Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

**Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)


Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.



## Romano el la flandra literaturo

En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historia periodo, tiu de la Nazaretano. Tiel, li reduktas siajn spertojn al simbola rakonto, transportante vivon kaj strebadon de individuo al nivelo universala. Li donas al sia rakonto filozofian substraton kaj en tiu maniero levas ĝin al tuthomara realeco.

## La migranta judo



Paĝoj: 72; ilustrita; 21 cm; vinktitaj;  
Prezo: 8,00 €

Informoj:  
tlf. +32 3 234 34 00;  
tlk. +32 3 233 54 33;  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

# Paradokso

La historieto pri balono (MONATO 2001/3) estis mis prezentita kaj multe perdis de tio. Laŭ mia scio, ĝi originas el iama matematika gazeto por lernejoj Kvant (Sovetio), kie ĝi aperis kiel anekdoto pri Sherlock Holmes kaj doktoro Watson.

**H**olmes kaj Watson glisis per balono kaj perdiĝis. Vidinte homon surtere, ili iom malaltiĝis kaj demandis: „Kie ni estas?” Iom pripensinte, la homo respondis: „En la balon-korbo”.

„Li certe estas matematikisto”, tuj konstatis Sherlock Holmes. „Kiel vi konkludis tion ĉi?”, demandas Watson. „Tre simple. Unue, ĉar li komence pripensis, kaj nur poste respondis”, diris Holmes. „Due, nur en matematiko respondo povas esti tiom vera kaj tiom senutila!”

Jen alia anekdoto pri matematikisto kaj inĝeniero – onidire el la sama fonto (tio estas tamen iom dubinda, kiel vi vidos). Temas pri paradokso de la heleno Zenono: rapidkura Aĥilo ne povos atingi senmovan foston, ĉar li devas trakuri la unuan duonon de la vojo, poste la sekvan duonon de la restanta vojo, kaj tiel plu ĝis infinito, do neniam atingas la celon.

Nun la anekdoto. Al matematikisto kaj inĝeniero oni proponis taskon (ne tute akademian): ĉe la muro de malplena ĉambro troviĝas nuda belulino. La du viroj ĉe la kontraŭa muro je distanco de dek metroj rajtas alproksimiĝi laŭ la jena maniero: dum la unua sekundo je unu duono de la distanco, dum la sekva sekundo je unu duono de la restanta vojo, ktp. La matematikisto tuj rezignis, sed la inĝeniero volis provi. „Kial vi konsentis?”, demandas la matematikisto. „Ĉu vi ne scias pri la paradokso de Zenono, kaj ke vi neniam atingos la celon ĉe tiaj kondiĉoj?!” „Mi scias, ke mi neniam alproksimiĝos je nula distanco”, la inĝeniero respondas. „Tamen ankaŭ la efika distanco sufiĉos!”

Por ajna okazo – kaj tute serioze – mi volas atentigi, ke tiaj anekdotoj pri matematiko aperas danke al matematekistoj mem, kaj sincere pensi, ke matematiko operacias nur per senutilaj trivialaĵoj povas nur personoj kun trivialaj scioj. Kiel estas envere,

eksplikas brila citaĵo de la fama fizikisto Eugene P. Wigner:

„La grandega utilo de matematiko por la naturaj sciencoj estas io mistera, por kio ekzistas neniu racia ekspliko. Ne estas nature, ke la leĝoj de la Naturo entute ekzistas, des malpli ke la homo kapablas malkovri ilin. La miraklo de konveneco de la matematiklingvo por formuli la leĝojn de la fiziko estas mirinda donaco, kiun ni nek komprenas, nek meritas.” (El eseo „Pri neniel atendata efektiveco de la matematiko por la fizikaj sciencoj”)

Alexander GOFEN

## Limerikoj

Viziti mi volas Parizon.  
Por tio jam havas mi vizon.  
Ĉu estas sufiĉe  
Por manĝi tre riĉe  
Kunporti nur pizojn kaj rizon?

\*

Promeni en bela somer'  
Ja estas tre plaĉa afer'.  
Se nur l' amikin'  
Promenus sen vin'  
Kontenta pri freŝa aer'.

\*

En Ulm kuŝis viro tre magra  
sur lit' kun mieno vinagra  
kun vosto avida  
kaj daŭre rigida  
pro troa glutad' de Viagra.

\*

Insul-vivis vir' el Tuluzo  
sen in' kiel Robinson Crusoe.  
Eĉ bestoj kun mammo  
ne taŭgas por amo.  
„Vendredo” nur restus por uzo.

Will GREEN



## anoncetoj

Por prezenti Esperanton dum urba forumo, la 29/09/01, nia grupo ŝatus ricevi bildkartojn kun salutvortoj el plej diversaj landoj. Antaŭdankon. Jean-Yves SANTERRE, Duret, 44410 HERBIGNAC, Francio.

**(Re)Abonu FONTO-n!** La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

**Naturista Vivo**, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4\*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, lhász Fő u. 41/5 HU-8531, rete: [jozefo@nl-papa.hu](mailto:jozefo@nl-papa.hu).

**Internaciisto**: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provexempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

ESPERANTO



# Eventoj

aperas dusemajne

pk. 87. Budapest,  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj fakso:  
+36-1-2828885  
[eventoj@hungary.net](mailto:eventoj@hungary.net)

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

## EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.

Petu provexempleron de:

Eventoj

Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario

Rete: [eventoj@esperanto.org](mailto:eventoj@esperanto.org)



## Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Iun tagon, Bruno kaj Maryvonne Robineau forlasis sian farmon en Francio por migri ĉirkaŭ la mondo dum ok jaroj, por iri renkonten al la homoj, dividante ilian laboron kaj ilian ĉitutagan vivon.

Ili rikoltas lentojn en hinda vilaĝo, iniciĝas al la ceremonio en Japanio, partoprenas geedziĝfeston en kanaka tribo de Nov-Kaledonio kaj spertas mortminacon en Gvatemalio.

La zamenhofa lingvo malfermis al ili la intimecon de multaj familioj. Bela homkolektado ekde ĉina kamparano ĝis bulgara oficiro, tra hungara instruisto aŭ japana kadruo.

*Fascina verko, kiu spiras kortuŝan homaramon kaj homecon.*

*(G. MacAoidh en Monato)*

Ili vivis sur la tero. 1998. Mendebla ĉe FEL kontraŭ 17,87 € + afranko.

## Enkonduko de la eŭro

**Atentu! Ĉu vi ankoraŭ havas frankojn, markojn, ŝilingojn, pesetojn, lirojn, guldenojn, eskudojn, draĥmojn aŭ irlandajn pundojn?**

Kiel vi verŝajne scias, en la 1a de januaro de la jaro 2002 ĉiuj belgaj, francaj kaj luksemburgaj frankoj, germanaj kaj finnaj markoj, aŭstraj ŝilingoj, hispanaj pesetoj, italaj liroj, nederlandaj guldenoj, portugalaĵoj eskudoj, grekaj draĥmoj kaj irlandaj pundoj iĝos senvaloraj. Finiĝos en tiu momento la transira periodo dum kiu tiuj monunuoj ankoraŭ estis validaj, kaj validos anstataŭe nur la eŭro.

Ĉu vi ankoraŭ posedas tiajn biletojn de iama vojaĝo aŭ kongreso? Estus domaĝe perdi ilin! Por ke tio ne okazu, Flandra Esperanto-Ligo proponas al vi senpagan intersanĝon al eŭroj laŭ la oficiala kurzo.

**Kion vi faru?** Kolektu la cititajn monbiletojn kaj sendu ilin en bone fermita koverto, eventuale registrite, al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Vi povas ankaŭ transdoni ilin al oficisto de FEL en la MONATO-budo dum la Universala Kongreso en Zagrebo, aŭ en la FEL-libroservo dum la Internacia Festivalo en Germanio (decembro 2001). FEL senpage konvertos la biletojn al eŭroj kaj aldonos tiun sumon al via FEL-konto (se vi ankoraŭ ne havas FEL-konton, oni volonte senpage kreos ĝin por vi). La eŭroj en via konto vi povos uzi kiel kutime por aĉeti librojn, por plilongigi vian abonon al MONATO, aboni al aliaj revuoj, pagi kongresojn, ktp.

Se restus iuj demandoj aŭ malklaraĵoj, ne hezitu skribi al nia financa konsilisto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be) aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



# IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

## Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

## Kiel funkcias?


Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

## Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi rricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

## Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo  
Frankrijklei 140  
2000 Antwerpen  
tlf. +32 3 234 34 00  
tlk. +32 3 233 54 33  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>



Stafeto  
librorondo

